



# EL POPOLO CÎNIO

人民中國報

5

1972

# 军民大生产

ĝjun min da ŝeng ĉan

Entuziasme kaj forte

Popolkanto de orienta Gansu



解 放 区 呀 么 嗨 嗨, 大 生 产 呀 么 嗨 嗨, 军 队 和 人 民  
 ĝje fang\* ĉjūi ja mo ho haj da ŝengĉan ja mo ho haj ĝjun duj hejen min  
 变 工 队 呀 么 嗨 嗨, 互 助 组 呀 么 嗨 嗨, 劳 动 的 歌 声  
 bjan gong duj ja mo ho haj hu ĝu zu ja mo ho haj laūdongde go ŝeng  
 妇 女 们 呀 么 嗨 嗨, 都 争 先 呀 么 嗨 嗨, 手 摇 着 纺 车  
 fu njūi men ja mo ho haj du ĝeng ŝjan ja mo ho haj ŝou jaŭĝuo fang ĉe  
 又 能 武 呀 么 嗨 嗨, 又 能 文 呀 么 嗨 嗨, 人 问 我 什 么 队 伍  
 joŭ neng u ja mo ho haj joŭ neng un ja mo ho haj jen un ŭo ŝi moduju  
 自 己 动 手 么 嗨 嗨, 丰 衣 足 食 么 嗨 嗨, 加 紧 生 产  
 zi ĝi dong ŝou mo ho haj feng ji zu ŝi mo ho haj ĝja ĝin ŝeng ĉan



西 里 里 里 嘹 啦 啦 啦 嘹 罗 罗 罗 吔, 齐 动 员 呀 么 嗨 嗨!  
 ŝi li li li ca la la la ŝou luo luo luo taj ĉi dong jūan ja mo ho haj  
 西 里 里 里 嘹 啦 啦 啦 嘹 罗 罗 罗 吔, 满 山 川 呀 么 嗨 嗨!  
 ŝi li li li ca la la la ŝou luo luo luo taj man ŝan ĉuan ja mo ho haj  
 吱 哼 哼 哼 吱 哼 哼 哼 喻 喻 喻 喻 吱 儿, 纺 线 线 呀 么 嗨 嗨!  
 ĝi ningning ning ĝi ningning ning ung ung ung ung ĝir fang ŝjan ŝjan ja mo ho haj  
 一, 二, 三, 四! 八 路 军 呀 么 嗨 嗨!  
 ji er san si ba lu ĝjun ja mo ho haj  
 西 里 里 里 嘹 啦 啦 啦 嘹 罗 罗 罗 吔, 为 抗 战 呀 么 嗨 嗨!  
 ŝi li li li ca la la la ŝou luo luo luo taj ŭej kang ĝan ja mo ho haj

\*Prononcu "ng" kiel velaran "n" sen aŭdigo de "g".

## La Teksto en Esperanto

### Produkta Kampanjo de la Armeo kaj Popolo

1. En la liberigita regiono ja mo ho haj, viglas produkta kampanjo ja mo ho haj, la armeanoj kaj popolanoj ŝi li li li ca la la la ŝou luo luo luo taj, ĉiuj aktivas ja mo ho haj!
2. Laborinterŝanĝaj taĉmentoj ja mo ho haj, interhelpaj grupoj ja mo ho haj, laborkantas ŝi li li li ca la la la ŝou luo luo luo taj, sur la montoj ja mo ho haj!
3. La virinoj ja mo ho haj, en konkuro ja mo ho haj, turnas ŝpinradojn ĝi ning ning ning ĝi ning ning ning ung ung ung ung ĝir, por produkti fadenojn ja mo ho haj!
4. Ni scipovas kaj batali ja mo ho haj, kaj labori ja mo ha haj. Kiu armeo ni estas? Unu, du, tri, kvar! La Okavoja Armeo ja mo ho haj!
5. Eklaboru mem mo ho haj, por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj ja mo ho haj, ni streĉe laboru ŝi li li li li ca la la la ŝou luo luo luo taj, por la Rezistmilito ja mo ho haj!



## Sur la Kovrilo:

Korifeo Jang Kiaŭ en la popol-  
kanto *Koralaj Lilioj Ruĝe Floras*  
*Pompe*.

## Sur la Dorskovrilo:

Venkinte la sekecan katastrofon  
kaj akirinte riĉan rikolton, ĉiuj  
brigadoj de la regiono plagita de  
trosekeco konkure pagas impos-  
tan grenon al la ŝtato por Long-  
giang-brigado, kies kampoj estas  
inunditaj pro barado de la rivero.

# EL POPOLA ĈINIO 人民中国报

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (166) 1972

## Ĉefa Enhavo

Rememoro pri la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an ...	2
La Malnova Opero Akiris Novan Aspekton .....	6
Fortepiana Konĉerto «La Flava Rivero» .....	9
Ludi la Rolon de Tiemej kaj Servi al la Revolucio .....	12
Kanti por Paŝtistoj .....	17
Scienca Esploro Fruktas, Dank' al Praktikado .....	20
Fiŝista Vilaĝo ĉe Bajjang-lago .....	23
Zigong — Produktejo de Putosalto .....	27
Majstro kaj Metilernanto .....	30
La Administraj Distriktoj kaj Konkiza Geografio de Ĉinio .....	32
Orelfungo de Dongning .....	34
Vortoj de la Redakcio .....	36
Amikeco Transdonita per Leterkolombo .....	37
Japana Dramtrupo "Dentrado" en Pekino .....	38
La Malpurigo de Ĉirkaŭaĵo Portis Plagon al la Japana Popolo .....	41
Ni Estas Samfamilianoj .....	44
Belarta Ekspozicio de Vjetnamio kontraŭ Usona Agreso por Nacisavo .....	48
Pri la Revolucia Moderna Pekinopero "Spirito de Longgiang" .....	52


# Rememoro pri la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an

*Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an publikigita de Prezidanto Maŭ Zedong en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito estas marksisma-leninisma dokumento kun granda historia signifo. Tiu ĉi verko plene kaj profunde solvis la problemon de la fundamenta direkto*

*de literaturo kaj arto, nome servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj difinis ĝustan linion por la disvolviĝo de la revoluciaj literaturo kaj arto de la proletaro de Ĉinio. Tiu ĉi verko estas potenca ideologia armilo por ni en konduko de ideologia kaj politika edukado kaj starigo de proletara mond-*



“Ŝafaro” (lignogravuro en 1940)



“En Kunveno por Redukti Terrenton” (lignogravuro en 1943)

koncepto por ĉiuj revoluciuloj.

En majo de 1942, mi ĉeestis kun granda honoro la Literaturan kaj Artan Kunsidon en Jan-an. La tiamaj okazaĵoj estas neforgeseblaj por mi dum la tuta vivo. Tiutempe la kontraŭfaŝisma milito de la tuta mondo estis en malfaciloj, la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo jam daŭris 5 jarojn, la japana imperiismo pliintensigis sian kruelan “balaadon” kontraŭ la liberigitaj regionoj kaj la kuo-mintanga reakciularo movis trupojn kun centmiloj da soldatoj por ataki kaj blokadi la liberigitajn regionojn. En Jan-an, Prezidanto Maŭ gvidis la revolucionan batalon de la tuta lando kaj venkoj estis gajnitaj unu post alia en la frontoj de militaj aferoj, politiko, ekonomio kaj kulturo. Por venki la malamikon kaj akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn, la tuta partio komencis stilĝustigan movadon, kiu celis ordigi nian vicaron en ideologio, politiko kaj organizo. En jaroj antaŭ la okazigo de la Literatura kaj Arta

Kunsido en Jan-an, multaj literaturaj kaj artaj laborantoj venis de diversaj lokoj de la lando al Jan-an kaj diversaj kontraŭjapanaj bazoj. Sed ilia mondkoncepto ankoraŭ ne estis bone reformita kaj nemalmultaj el ili traktis kun malnovaj pensoj kaj sentimentoj la novan medion, novajn amasojn kaj revolucionan literaturan kaj artan aferon. La Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an celis disvolvi stilĝustigan movadon en la literaturaj kaj artaj rondoj kaj ankaŭ estis konsistiga parto de la stilĝustiga movado gvidata de Prezidanto Maŭ.

La Literatura kaj Arta Kunsido okazis en la kunvena halo de la Centra Oficejo de la Komunista Partio de Ĉinio en Janggialing de Jan-an. Dum la daŭro de unu monato, Prezidanto Maŭ trifoje ĉeestis la kunsidon persone. Unuafoje je la 2-a de majo, 1942. Posttagmeze, Prezidanto Maŭ en grizaj vestoj paŝis en la kunvenejon viglanime kaj afable man-

# 擁護我們老百姓自己的軍隊



“Ni Subtenas Nian Propran Armeon” (lignogravuro en 1944)

premis kun la ĉeestantoj unu post alia. Tiam mi estis forte emociita. Estis la prizorgo kaj flegado de Prezidanto Maŭ al la junuloj, dank’ al kiuj mi, nove bakita arta laboranto, povis ĉeesti tian kunsidon kun historia signifo.

En la kunsido, Prezidanto Maŭ parolis la unua. Li diris: “Gekamaradoj! Vi estas invitataj hodiaŭ al la kunsido por interŝanĝi opiniojn kaj studi pri la rilato inter la laboroj literaturaj kaj artaj kaj la ĝenerala laboroj revoluciaj por ke la revoluciaj literaturo kaj arto disvolviĝu laŭ ĝusta vojo, kaj ke la revoluciaj literaturo kaj arto pli bone helpu al aliaj revoluciaj laboroj, tiel ke ni povu faligi nian nacian malamikon kaj plenumi la taskon de nacia liberiĝo. . .” La vortoj de Prezidanto Maŭ en la elparola maniero de Hunan-

provinco estis popularaj, facile kompreneblaj kaj tre intimaj. Tiu parolado de Prezidanto Maŭ estis ne tre longa, sed tre riĉa kaj profunda estas ĝia signifo kaj tiu granda dokumento de marksisma literatura kaj arta teorio formis la enkondukon de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*. Poste, Prezidanto Maŭ petis la ĉeestantojn diri siajn opiniojn, kaj la kunsido daŭris ĝis la vespero.

La dua kunveno okazis post kelkaj tagoj de la unua. En ĝi, la ĉeestantoj vigle prenis la parolon por esprimi siajn malsamajn opiniojn. Iuj kamaradoj raportis siajn komprenadojn el praktikaj spertoj en literatura kaj arta laboro en kontraŭjapanaj bazoj kaj esprimis sian firman decidon nepre diligente studi kaj labori laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ en la estonteco; aliaj malkaŝis sian burĝaran literaturan kaj artan penson en la kunveno kaj kaŭzis varman disputon. Prezidanto Maŭ atente aŭskultis la vortojn de ĉiuj parolantoj, kaj iam kaj tiam faris notojn per kraĵono aŭ intermetis signifoplenajn kaj spritajn vortojn al alies paroloj.

La tria kunveno okazis posttagmeze de la 23-a de majo. Prezidanto Maŭ intencis fari konkludon en ĝi. Unue li demandis al la ĉeestantoj: “Gekamaradoj, ĉu vi ankoraŭ havas ion por diri?” Tuj poste iuj stariĝis kaj postulis parolon. Prezidanto Maŭ refoje petis la ĉeestantojn plene eldiri siajn opiniojn kaj atendis ĝis ĉiuj, kiuj havis opinion, tion faris. Posttagmeze, Prezidanto Maŭ diris al la kunvenantoj, ke ili vespermanĝu ĉe Janggialing kaj daŭrigu la kunvenon post la manĝo. Eble dum la vespermanĝo kaj paŭzo, oni diskonigis la novaĵon, ke Prezidanto Maŭ faros paroladon en tiu vespero. Informiĝintoj pri tio ĝoje venis al Janggialing kaj petis permeson aŭskulti la paroladon de Prezidanto Maŭ. Tiel multe da homoj alvenis, ke ilia nombro pluroble superis tiun de la antaŭaj kunvenantoj kaj la kunvena halo jam neniel povis enteni ĉiujn. Do la kunvenejo estis translokigita al placo ekster la domo. Pro manko de tempo por aranĝado, oni nur alportis unu tablon kaj kelkajn seĝojn kaj stari-



gis tri arbotrunkojn en formo de tripiedo por pendigi petrolan lampon, kiu hele lumigis la gajajn vizaĝojn de la ĉeestantoj. Ĉiuj kamaradoj atente aŭskultis la paroladon de Prezidanto Maŭ, kiu formis la "Konkludon" de la granda dokumento de marksisma literatura kaj arta teorio *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*.

Post finaŭskulto de la parolado de Prezidanto Maŭ jam estis profunda nokto. Sur la revena vojo, ni ankoraŭ sentis fortan emociiĝon. Ĉiuj ĝoje interparolis pri la instruoj de Prezidanto Maŭ kaj firme decidis bone studi kaj efektiviĝi ilin en la estonto.

Tuj post la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, potenca stilĝustiga movado de literaturo kaj arto disvolviĝis en Jan-an kaj la kontraŭjapanaj bazoj. Prenante la dokumenton kiel la ideologian armilon, oni kondukis seriozan kritikon kontraŭ la literatura kaj arta penso de la burĝaro kaj feŭda klaso. Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ, revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj unuj post aliaj profundiĝis en la batalan vivon de la popolamasoj. Dum lernado al la amasoj, ili kreis multajn literaturajn kaj artajn verkojn ŝatatajn de la popolamasoj. Ekzemple dum la Printempa Festo de 1943, oni prezentis en la amuza kunveno de la armeo kaj popolo de Jan-an novan jango-dancon, kiu estis varme akceptata de la amasoj kaj nomata de ili kiel "jango-danco de liberiĝo". Jan-anaj literaturaj kaj artaj laborantoj raportis siajn unuajn sukcesojn al Prezidanto Maŭ. Tamtamante, tamburante kaj tenante kolorajn flagojn ili venis al Janggialing kaj faris prezentadon sur la placo, kie Prezidanto Maŭ faris la paroladon. Aŭdinte la tamtamadon kaj tamburadon, la armeanoj kaj pololanoj loĝantaj proksime de Janggialing ĝoje kolektiĝis kaj plenigis la deklivon. Estis plej granda honoro por ni, ke ankaŭ Prezidanto Maŭ persone rigardis la prezentadon. Prezidanto Maŭ ridis de tempo al tempo kaj la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj ricevis fortan kuraĝigon.

Rememorante la prizorgon kaj flegadon de Prezidanto Maŭ al mi en mia juneco, mi sentas senkomparan feliĉon. Kiam mi estis studanta en la Lusina Literatura kaj Arta Instituto de Jan-an, Prezidanto Maŭ persone venis en nian lernejon kaj kore instruis al ni, ke ni devas iri el la malgranda instituto kaj iri en grandan "instituton" por studado. Prezidanto Maŭ nomis la ardan batalon de la popolamasoj kiel "grandan instituton" kaj montris per sia konsilo senkomparan zorgon kaj kuraĝigon al ni. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ, ni iris unuj post aliaj el la klasĉambroj kaj iris studi en la popolamasoj. Mi kaj kelkaj samlernejoj kune venis

en vilaĝon de Jan-an kaj lernis tie de la popolamasoj. La laboranta popolo de tiu loko suferadis en la malnova tempo kruelan subpremon kaj vivis pli mizere ol ŝarĝbrutoj; hodiaŭ sub la gvido de Prezidanto Maŭ ili liberiĝis kaj fariĝis mastroj. Ili travivis du tute malsamajn sociojn, havas altan klasan konscion kaj riĉan batalan sperton kaj eminentan kvaliton de diligenteco kaj kuraĝeco. Mi vivis kune kun ili, lernis de ili multajn valoraĵojn kaj ricevis grandan progreson en ideologio kaj sentimentoj. Ĉar ili longe suferis sub la regado de feŭda ekspluatanta klaso, ili ne scipovis legi kaj estis malkleraj, mi do instruis al ili legadon per bildoj. Mi partoprenis laboron de la hiang-a registaro kaj kontaktiĝis kun multaj novaj aferoj en fizikaj kaj mensaj laboroj. La novaj homoj kaj novaj aferoj en la kamparo stimulis min entuziasme lerni lignogravuran arton por ilin speguli. Mi portis miajn lignogravuraĵojn al kamparanoj kaj petis konsilojn de ili. Ili entuziasme helpis min, montris al mi mankojn kaj faris proponojn al mi por ilin plibonigi. Foje, mi donis al ili pentraĵon por lignogravuraĵo pri hejmenrevenanta ŝafisto por peti iliajn opiniojn. Kelkaj kamparanoj atente rigardis kaj diris poste: "Paŝtante ŝafojn sen hundo, oni devas suferi perdon pro lupo. Estas bone, ke ŝafpaŝtisteto kunportu jutosakon por sin ŝirmi de vento kaj pluvo kaj porti nove naskitan ŝafidon, se ŝafino akuŝas surmonte. . ." Tian valoran opinion mi ne povis aŭdi en la klasĉambro de la instituto. Mi aŭskultis iliajn opiniojn kun plezuro kaj foje kaj refoje korektis la pentraĵon ĝis ili kontentiĝis pri ĝi. Ĉar en la popolamasoj estas neelĉerpebla fonto de verkado kaj multaj bonaj instruistoj por min helpi, tial senĉese produktiĝis miaj verkoj. Vidante en tiuj bildoj scenojn de sia vivo post la liberiĝo, kamparanoj montris honestan rideton kaj mi estis multe kuraĝigita de tio. Mi pli profunde komprenis la instruon de Prezidanto Maŭ, ke revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj **"nepre devas iri en la mezon de la popolamaso, nepre devas iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn, en la solan, plej vastan kaj plej riĉan fonton. . ."** Kiel ĝustaj estas tiuj vortoj!

Forpasis jam 30 jaroj post la publikigo de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj je ĉiujfoja tralego de ĝi mi ricevis profundan edukon. Tiu ĉi brila verko ĉiam lumigos la direkton kaj vojon de la revoluciaj literaturo kaj arto kaj mi ĉiam klopodos krei artajn verkojn en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.

\**Lignogravuristo*

# La Malnova Opero Akiris Novan Aspekton

— Rememoro pri prezentado de *Premite al  
Liangŝan-monto por Ribeli* en Jan-an

POST la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en la jaro 1937, kortuŝite de la granda Norda Ekspedicio gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio por rezisti la japanan agreson post la 25,000-lia Longa Marŝo, mi forlasis Ginling-universitaton de Nankino, kunportante violonon kaj kelkajn librojn, inter kiuj sin trovis esperanta vortaro. Post la kolektiĝo proksime de Hi-an, mi kaj miaj samlernejanoj iris 800 liojn dorse portante niajn pakajojn kaj venis al la tagnokte sopirata Jan-an. Tiutempe

plejparto de la literaturaj kaj artaj laborantoj en Jan-an, same kiel mi, estis venintaj de la regionoj regataj de Kuomintango. Kvankam ili havis grandan revolucionan entuziasmon, tamen ne sciis kiel servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tiam la scenejo de la pekina opero en Jan-an ankorau estis regata de imperiestroj, reĝoj, generaloj kaj ministroj, dandoj kaj belulinoj, kaj oni ankoraŭ prezentis modernajn teatraĵojn kun enhavo de malnovaj urbanoj kaj “nacidefenda” dramo. La 2-an de majo 1942, Prezidanto Maŭ persone kunvokis la Literaturan kaj Artan Kunsidon en Jan-an. Tiam mi laboris en la Literatura kaj Arta Sekcio de la Centra Esplora Instituto, tial ankaŭ mi gloriĝis tiun kunsidon.

La vivecaj kaj signifoplenaj paroladoj faritaj de Prezidanto Maŭ ĉe la kunsido montris direkton al la revoluciaj literaturo kaj arto kaj ankaŭ lumigis nian koron. Ili komprenigis al ni gejunuloj ke la revoluciaj literaturo kaj arto estas dentrado kaj ŝraŭbo en la tuta revolucia maŝino kaj nepre devas esti kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por ke ili ludu rolon por unuigi kaj eduki la popolon kaj bati la malamikon. Por servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, oni devas antaŭ ĉio iri en ilin por lerni de ili kaj koni ilin. Observante la direkton montritan en la paroladoj, ni venis inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, laboris kaj faris verkan aktivadon kaj prezentadon kune kun ili. Ni verkis kaj prezentis en granda nombro diversajn malgrandajn vivecajn programerojn respugulantajn la vivon kaj batalon de la popolo de la liberigitaj regionoj kaj kolektis eminentajn verkojn inter la popolamasoj. Multaj bonaj *jango*-teatraĵoj, popolkantoj, kompozicioj kaj aliaj estis tiam produktitaj. Ankaŭ la brila himno *Ruĝas la Oriento* estis verkita de kamparano Li Joŭjuan en tiu periodo laŭ melodioj de popolkanto.



Kamarado Gin Ziguang kun la heroaj fratinoj Longmej kaj Jujong en paŝta regiono





*Lin Ĉong (la dua de maldekstre) ludata de la verkinto Gin Ziguang en la pekina opero Premite al Liangŝan-monto por Ribeli, en 1944.*

Sub la lumo de la paroladoj multaj muzikaĵoj, dancoj, *jango*-teatraĵoj kaj aliaj ŝatataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj aperis pompe kiel bambuidoĵ post printempa pluvo. Je la Printempa Festo de la jaro 1943, la unua Printempa Festo post la kunsido, ĉie flirtis ruĝaj flagoj, bruis tamburoj kaj tamburoj, sonis kantoj kaj viglis dancoj sur stratoj de Jan-an kaj en montvilaĝoj ĉirkaŭ oficejoj dum la aktivadoj por subteni la registaron kaj ami la popolon, subteni la armeon kaj prizorgi la familianojn de armeanoj. Senprecedence multaj estis la spektatoroj. Tiuj vivecaj scenoj donis al mi plian edukon kaj konigis al mi ke estas senkompare ĝusta la direkto de literaturo kaj arto servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la proletara politiko.

La belaj floroj de literaturo kaj arto aperintaj en la unua printempo post la paroladoj ricevis ne nur aprobon kaj admiron de la vastaj amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sed ankaŭ allogis la revoluciajn kadrojn. Tiutempe mi lernis en la Centra Partia Lernejo. Prezidanto Maŭ estis ĝia estro. Ankaŭ multaj militaj kaj politikaj kadroj studentaj en la lernejo volis reformi la malnovan pekinan operon en novan por prikanti la laboristojn kaj kamparanojn, vidante ke la malnova *jango*-danco povas esti reformita en novan *jango*-teatraĵon kun revolucia enhavo. Kamaradoj tuj organizis amasan amatoran artesploran rondon, en kiu ankaŭ mi partoprenis. Tiel ni komencis eksperimenton por reformi la pekinan operon.

Ni prenis kiel temon la rakonton pri Lin Ĉong el la ĉina klasika romano *Ĉe la Akvorando*. En la adapta laboro partoprenis literaturaj kaj artaj labo-

rantoj, historiisto kaj veteranoj de militaj kaj politikaj laboroj. Observante instruon de Prezidanto Maŭ ni verkis novan operon pri Lin Ĉong per vidpunkto de historia materiismo. En septembro de 1943, ni kompletigis la operon *Premite al Liangŝan-monto por Ribeli* kaj surscenigis ĝin en novembro. Ĉar la laboro ricevis intiman zorgon kaj konkretan direkton de kamaradino Giang King, la libreto, prezentado kaj la sceneja belarto de la opero estis plibonigitaj. Kiam kamaradino Giang King transdonis al ni la instrukcion de Prezidanto Maŭ ke li volas legi la manuskripton, ni tre ekscitiĝis. Tiunokte ni faris modifojn kaj sendis ĝin al Prezidanto Maŭ.

*Premite al Liangŝan-monto por Ribeli* ĉefe priskribas Lin Ĉong, trejniston de 800,000 armeanoj en la Orienta Ĉefurbo (la nuna Luojang) de Songdinastio. Post kiam lia edzino estis forrabita de iu feŭda reganto, li estis ekzilita al fora loko. La feŭda reganto sendis siajn lakeojn postsekvi lin por lin murdi survoje. Kun nebridebla indigno li mortigis la lakeojn kaj premite de tiu situacio iris al Liangŝan-monto, bazo de tiama kamparana insurekcio. La malnova dramo sole priskribis individuan malfeliĉon, tragikan karakteron kaj heroan aktivadon de Lin Ĉong.

Nia adaptaĵo radikale diferencas de la malnovaj libretoj. Antaŭ ĉio, observante la instruon de Prezidanto Maŭ ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido kaj movinte la starpunkton al la popolamasoj, ni studis kaj analizis multajn historiajn materialojn per vidpunkto de historia materiismo por trovi la ĉefan kontraŭdiron de la tiama socio. La dramo koncentre respiegulas la veran fizionomion de la historia vivo per priskribo de la batalo de Lin Ĉong

kaj la amasoj ĉirkaŭ li kontraŭ feŭdismo. La adaptita dramo prenas la individuan malfeliĉon de la ĉefrolo Lin Ĉong nur kiel enkondukon de la tuta dramo, kaj samtempe kun priskribo de Lin Ĉong respegulis la ribelan spiriton de la popolamasoj kaj la feŭdan socion, en kiu la popolanoj ne povis sin vivteni, ilia indigno bolis kaj popolaj ribeloj leviĝis ĉie. La historio estas kreita de la popolo kaj la popolamasoj estas veraj herooj. En la dramo la popolo fariĝis mastro de la historio kaj la reakciaj regantoj fariĝis feĉo, la pasinte inversigita historio estis reinversigita kaj ties propra fizionomio estis redonita al la historio. Ĝi jam ne sole priskribis individuan malfeliĉon de Lin Ĉong kaj lian heroan tragedion, sed respegulis la historian staton de la tiama socio kaj la reziston kaj batalon de la vastaj amasoj ĉirkaŭ li.

Ĉar tiam la Kontraŭjapana Rezistmilito troviĝis en la interdetena stadio, dum kiu la kuomintanga reakciularo ekstere faris kompromison kaj kapitulacion kaj interne praktikis faŝisman tiranadon, la prezentado de *Premite al Liangŝan-monto por Ribeli* havis realan signifon kaj edukon. Tio fariĝis unu el la gravaj kialoj ke la opero ricevis varman akcepton de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Dum la Novjara Festo de 1944, Prezidanto Maŭ persone venis en la kunvenan halon de la Partia Lernejo por rigardi nian prezentadon. Tiam mi ludis la ĉefrolon Lin Ĉong en la opero. En tiu tago ni frue iris al la kuliso por ŝminkado kaj streĉe atendis. Ni foje kaj refoje kontrolis la dekoracion, lumigadon kaj vestojn, la fajro brulis arde en la lignokarbaj kuvoj por varmigi la kunvenan halon. Sopirante Prezidanton Maŭ mi rigardis eksteren de tempo al tempo tra la fenestroj de la kuliso. Ho, la granda gvidanto! Vi, intense opukata per komando en la Kontraŭjapana Rezistmilito, speciale venis rigardi nian prezentadon, kio ja estis vere granda zorgo al ni. Dum mia meditado, subite oni diris: "Prezidanto Maŭ venis!" Mia animo pli streĉiĝis kaj plenis de ĝojo, ankaŭ la spektatoroj estis en jubilo. Post komenciĝo de la prezentado kaj antaŭ mia sursceniĝo, mi staris ĉe flanko kuliso kaj ĵetis mian rigardon al la sidloko de Prezidanto Maŭ. Mi vidis ke la gvidanto en brila sano rigardis nian prezentadon absorbite kaj ridetis de tempo al tempo, kio donis al mi tre grandan inspiron. Mi sentis ke la tiutaga prezentado estis pli bona ol tiu en iu ajn alia tago. Sed post la prezentado, ni estis ankoraŭ necertaj pri tio, kian impreson Prezidanto Maŭ ricevis de ĝi? La sekvantan tagon

korporgardisto de Prezidanto Maŭ venis al ni kun lia letero. Prezidanto Maŭ skribis en ĝi: "Rigardinte vian prezentadon, mi trovis, ke vi faris tre bonan laboron, kaj esprimas mian dankon al vi kaj, pere de vi, ankaŭ al ĉiuj kamaradoj aktoroj! La historio estas kreita de la popolo, sed sur la scenejo de malnova opero (kaj en ĉiuj malnovaj literaturaĵoj kaj artaĵoj forlasintaj la popolon) la popolo ja fariĝis feĉo, kaj la scenejon regas sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoridoj kaj sinjoridinoj. Tian inversigon de la historio vi nun reinversigis, redonante al la historio ties propran fizionomion, kaj de nun la malnova opero akiris novan aspekton; tio ĉi meritas gratulon. Via iniciato estas epokfara komenco de revolucio por la malnova opero, kaj pensante pri tio, mi tre ĝojas kaj esperas, ke vi daŭre verkos kaj ludos multe, por ke tio fariĝu populara kaj disvastiĝu tra la tuta lando!" Legante la intiman inspiron leteron de Prezidanto Maŭ, mi estis emociita ĝis larmoj. Prezidanto Maŭ varme laŭdis la operon *Premite al Liangŝan-monto por Ribeli* kaj montris helan vojon al la reformo de la teatro, ke nia koro estis lumigita, niaj okuloj pli akriĝis kaj pligrandiĝis nia entuziasmo en servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ni decidis nepre ne vanigi la esperon de Prezidanto Maŭ kaj daŭrigi nian klopodon por verki kaj ludi multe, por ke tio fariĝu populara kaj disvastiĝu tra la tuta lando!

Poste, iuj el tiuj kamaradoj kiuj adaptis kaj prezentis la operon transposteniĝis al la Jan-ana Pekinopera Teatro, la epokfara letero de Prezidanto Maŭ fariĝis lerno-dokumento kaj labor-direktilo por la kamaradoj de la teatro. Laŭ tiu orientilo la Jan-ana Pekinopera Teatro verkis alian revolucionan pekinoperon *Tri Atakoj kontraŭ Ĝugiaĝuang-vilaĝo*.

Forpasis jam tridek jaroj. La revolucio trairis sennombrajn ŝanĝiĝojn kaj la salikoj antaŭ la kunvena halo en Janggialing de Jan-an jam grandiĝis kaj donas riĉan ombron, la revolucia pekinopero disvolviĝis de la tiama *Premite al Liangŝan-monto por Ribeli* al nunaj pli multaj modelaj revoluciaj pekinoperoj ŝatataj de la tutlanda popolo. Kvankam la irota vojo estas zigzaga kaj malfacila, tamen dank' al la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ ni certe venkos. Dum la flora sezono, mi nepre, laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ en la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, kontribuos mian tutan forton por krei socialismajn literaturon kaj arton kaj aldonos plian koloron al la bela printempo.

---

\*La aŭtoro estas respondeculo de la Pekinopera Trupo de Pekino.



JIN ĈENĜONG\*:



*Jin Ĉengĝong ludas la fortepianan konĉerton La Flava Rivero.*

# Fortepiana Konĉerto «La Flava Rivero»

EN aŭtuno de 1971, kune kun la Ĉina Baleta Trupo, mi veturis al orienta Eŭropo por fari viziton kaj prezentadon en Albanio, Rumanio kaj Jugoslavio. Tie mi prezentis la fortepianan konĉerton *La Flava Rivero*, kiu estis varme akceptata de la spektatoroj. Iuj spektatoroj diris, ke ili akiris inspiron de la emocia muziko. Neforgesebla estas la prezentado en la sporta halo de la urbo Ljubljana de Jugoslavio. Kiam mi ludis la kvaran parton “Defendi la Flavan Riveron” kaj en ĝia fino eksonis la melodio de *La Internacio*, la spektatoroj stariĝis kaj varme aplaudis. Ĉiufoje kiam mi rememoras la emocian scenon, mi ĉiam sentas varmon en la koro kaj ekhavas neelĉerpeblan forton.

La fortepiana konĉerto *La Flava Rivero* estas kreita sur la bazo de *Kantato de la Flava Rivero* verkita de la revolucia muzikisto Hian Hinghaj (1905-1945) en la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito. La kantato havas 8 partojn. Ĝia muziko estas impona kaj solena, kaj ĝiaj melodioj estas simplaj kaj fortaj. Iuj melodioj vaste cirkulis en la popolo kaj armeo dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tio estas favora kondiĉo por nia kreado.

Dum la kreado ni ripetade studis koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ en tiu periodo, dank’ al kio ni akiris pli profundan komprenon pri la situacio de la tiama klasa batalo. Tamen, kiel speguli per instrumenta muziko la grandan temon de popola milito? Kiel reliefigi la heroajn figurojn de la proletaro kaj laboranta popolo por pli bone servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj? En 1969, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ke ni “**nepre devas ŝanĝi sian starpunkton, . . . transigi ĝin al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la flanko de la proletaro . . . Nur tiamaniere ni povos havi literaturon kaj arton vere por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vere proletajn**”, ni venis al la revolucia bazo apud la Flava Rivero por fondiĝi en la vivon.

La Flava Rivero ruliĝas muĝante kaj galopas senrevenue tra miloj da kilometroj. Ĝia vasta sino kaj nefleksebleco simbolas la revolucionan spiriton de la ĉina nacio. En la daŭro de miloj da jaroj, nia laboranta popolo laboris, batalis kaj vivis ĉe ĝi, skribis sian longan historion kaj kreis sian brilan kulturon.


Tage ni laboris kune kun komunumanoj kaj ŝiptiradis kune kun ŝipistoj sur malvastaj kaj zigzagaj vojetoj apud la rivero. Nokte ni ripozis kune kun ili en kaverndomoj kaj aŭskultis revoluciajn rakontojn de veteranoj de la Ruĝa Armeo kaj gerilaj taĉmentoj kaj maljunaj ŝipistoj kiuj faris bravajn batalojn kontraŭ japanaj agresantoj. Ili estas kreantoj de la historio. Ilia modesta kaj honesta fizionomio, nobla penso, klara amo kaj malamo kaj heroa travivaĵo profunde gravuriĝis en nia koro. La problemo kion kaj kiel prikanti, estis pliapaŝe solvita. Samtempe, la riĉa fonto nutris min kaj donis al mi sufiĉan nutraĵon por ludi la rekreaĵon. Ĉiufoje kiam mi ludis sur scenejo, reaperis en mia memoro la viditaj scenoj kaj pensoj ruliĝadis kiel la torento en la Flava Rivero.

Fortepiano kaj simfonia orkestro havas riĉan espriman povon, tamen la formo de malnova koncerto estas nekompetenta por esprimi novan revolucion enhavon. Ĝi devas esti reformita. Post longa polurado naskiĝis la fortepiana koncerto *La Flava Rivero* konsistanta el 4 interligitaj partoj, nome "Kanto de Ŝipistoj de la Flava Rivero", "Odo al la Flava Rivero", "Indigno de la Flava Rivero" kaj "Defendi la Flavan Riveron". La unua parto, kiu manifestas la neflekseblan batalan spiriton de la ĉina popolo, la dua parto, kiu retrorigardas la longan historion de la ĉina nacio kaj la gloran re-

volucian tradicion de la ĉina popolo, ĉiuj prikantas el diversaj anguloj la heroecon de la ĉina popolo. La tria parto, kiu koncentre montras la indignan oponon de la batalanta ĉina popolo kontraŭ la malamiko. Poste eksonis la lasta kerna parto kun la tema penso de *La Flava Rivero* kaj vidiĝis impona bildo de ŝtorma popola milito. En la fino de tiu parto estis enplektitaj la melodioj de *Ruĝas la Oriento* kaj *La Internacio*, kio manifestas la belegan bildon, ke la ĉinaj proletaro kaj popolo firme staras kune kun la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo kaj decidis batali ĝisfine por plena emancipiĝo de la homaro. Tiamaniere la tema penso estis levita al la alteco de internaciismo.

Fortepiana koncerto *La Flava Rivero* naskiĝis sub la intima direktado de kamaradino Giang King kaj gvidado de la granda principo de Prezidanto Maŭ "Utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo", "utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio" kaj "elvolvi novon el malnova". Por speguli revolucion politikan enhavon de la proletaro, ĝi faris reformon al la artformo de eksterlanda instrumenta muziko kaj ensorbis ĝiajn multajn raciajn partojn, tiel ke plene disvolviĝis la speciala riĉa esprimo de koncerto kiu prenas fortepianon kiel la ĉefan instrumenton kaj simfonian orkestron kiel akompananton.

*Ludo de la parto "Indigno de la Flava Rivero" el la koncerto.*





Kamarado Jin  
Ĉengĝong (dekstre)  
kaj aliaj sur la  
bordo de la Flava  
Rivero




Ekzemple, en la partoj “Kanto de Ŝipistoj de la Flava Rivero” kaj “Defendi la Flavan Riveron” ni aplikis kadencon. En iuj burĝaraj konĉertoj kadenco estas uzata de ludanto por parado de tekniko. Tiu parto povas esti laŭplaĉe improvizita de ludanto. En *La Flava Rivero* ni kritike adoptis la formon de kadenco kaj plene utiligis ĝian karakterizaĵon de alta ludotekniko por modli specialajn figurojn. En la “Kanto de Ŝipistoj de la Flava Rivero” estas kadenco, kiu vive bildigas la ruliĝantan Flavan Riveron kaj vidigas la scenon en kiu ŝipistoj batalas kontraŭ ondegoj kaj danĝeraj malprofundejoj kaj akiras venkon.

La fortepiana konĉerto *La Flava Rivero* ne nur estas nova en enhavo kaj arta formo, sed ankaŭ faris novan iniciaton en pianludado kaj apliko de naciaj muzikiloj. Ĉe la komenco de “Indigno de la Flava Rivero” oni aŭdis la melodion *hintianjoŭ* de norda Ŝenhi, ludatan per ĉina fluto. La flutado klare markas, ke temas pri kontraŭjapana revolucia bazo de norda Ŝenhi, pri Jan-an, pri liberigita regiono. Tuj sekve, la konĉerto aplikis tradiciajn teknikojn de ĉina antikva plukmuzikilo *ĝengo* kaj ĉina zimbalono, tiel ke la melodioj fariĝis pli klaraj, pli viglaj kaj plene manifestis la vivecplenan scenon en revolucia bazo, kie brilas la suno kaj prosperas la revolucia afero. Poste, por priskribi la suferon kaj indignon de la popolo post entrudiĝo de mal-

amikoj, la fortepiano imitas la “fingroalternan” ludon de ĉinaj naciaj plukmuzikiloj, kaj per melodioj profundaj kaj indignaj montras la fortan indignan akuzon de la popolo kontraŭ la malamikoj kaj la brulantan klasan kaj nacian malamon. Alieksemple, en ludado de “Defendi la Flavan Riveron” oni uzis liuton, aplikis plej bonajn antikvajn muzikajn verkojn kaj per interplekto de ludado de liuto kaj fortepiano reliefigas la bravan scenon, ke senĉese disvolviĝas la popola milito kaj milionoj da soldatoj kaj popolanoj viglas kaj brave ekstermas malamikojn sur batalkampo.

Por fariĝi proparolanto de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, literaturistoj kaj artistoj unue devas esti iliaj lernantoj. Sen revolucio en sia ideologio ili ne povas fari revolucion en arto. Kiam ni memorigas la 30-an datrevenon de la publikigo de *Paroladoj ĉe Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ, mi retrorigardis mian iritan vojon, restudis la brilan verkon kaj sentis varmon en la koro. Farinte la praktikadon en revolucio kaj arto en kreado de la fortepiana konĉerto *La Flava Rivero*, mi grandpaŝe antaŭenmarŝas kun plena memfido laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ, por gajni pli grandajn venkojn.

\*La aŭtoro estas fortepianisto de la Centra Muzika Ensemblo de Ĉinio.



*Liu Ĉangju ludas la rolon de Li Tiemej en la Fortepiana Muziko "Ruĝa Signal-lanterno" kun Kantado de Pekina Opero.*

# Ludi la Rolon de Tiemej kaj Servi al la Revolucio

**O**KAZE de la 30-a datreveno de la publikigo de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, mi denove studis la brilan verkon kaj sentis ĝin aparte kara. Hodiaŭ ĝojinde brilas artaj figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur la pekin-opera scenejo kaj prezentigas vasta perspektivo de la proletaraj literaturo kaj arto.

La pekina opero estas unu el la specoj de opero kun historio de pli ol 200 jaroj kaj vasta cirkulado en nia lando. En la komenco, ĝi estis formita surbaze de la kantoj kaj muziko de lokaj operoj de la provincoj Anhuj kaj Hubej, kaj poste transiris en Pekinon kaj aliajn lokojn. Post longa prezentado de artistoj, ĝi prenis al si intensan lokan koloron de Pekino en muziko, kantado kaj parolo, kaj fariĝis unu el la ŝatataj teatraĵoj de nia popolo.

Por teni sian reĝimon, la regantoj de ĉiuj historiaj periodoj de Ĉinio energie beligis sian klason kaj malbeligis la laborantan popolon. De longa tempo, sur la pekin-opera scenejo estis prezentataj nur reĝoj, generaloj, dandoj kaj belulinoj. Post la Liberigo, por restaŭri kapitalismon en Ĉinio, Liu Ŝaŭki freneze oponis kontraŭ la politiko pri teatro elmetita de Prezidanto Maŭ "**kune floru cent floroj, disvolu novon el malnovo**". Sub la preteksto de disvolvo de la tradiciaj teatraĵoj, li ellasis malbonajn teatraĵojn kiuj beligas naciperfidulojn kaj eksponas pornografiaĵojn kaj trivialajn interesojn por korodi kaj narkoti la popolon.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, mi trovis ke la spektantoj de la malnova pekina opero pli kaj pli malmultiĝis kun la disvolviĝo de



la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando kaj inter ili la plejmulto estas maljunuloj kaj intelektuloj. La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj gelernantoj pli kaj pli antipatiis tiujn malnovajn teatraĵojn. Rimarkinte tion, mi volis scii la kaŭzon, sed klaran respondon mi ne povis trovi.

En 1962, Prezidanto Maŭ faris alvokon, ke la tuta partio nepre ne forgesu klasan batalon en la Dekaj Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de KPC. Poste, kun revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj sub sia gvido, kamaradino Giang King iniciatis revolucion en la pekina opero. De tiam ŝanĝiĝis la stato de la regado de reĝoj, generaloj, dandoj kaj belulinoj super la pekin-opera scenejo. La pekin-opera trupo, en kiu mi laboras, ludis la revolucion modernan pekinan operon *Ruĝa Signal-lanterno*.

Mi profunde komprenas el mia sperto, ke ludado de pekina opero kun moderna temo estas revolucio. Mi eklernis la pekinan operon en la Ĉina Kolegio de Pekina Opero en la 9-jara aĝo kaj dum dekelkaj

jaroj ludadis rolojn de nobela fraŭlino k.s, tial miaj pensoj kaj sentimentoj ĉiam pli proksimiĝis al tiuj de la roloj. Tiam mi strebadis nur al famiĝo kaj promociiĝo kaj nenion sciis pri kreo de heroaj figuroj de la proletaro kaj pri la servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sub la direktado de literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, mi komprenis, ke ludi revolucion modernan operon ja estas devo de la revoluciaj teatraj laborantoj de nia lando. Por ludi revolucion modernan teatraĵon, oni devas krei tipojn de proletaraj herooj, kaj por bone plenumi ĉi tiun taskon, la aktoroj antaŭ ĉio devas transigi sian starpunkton al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, t.e. nepre interligi siajn pensojn kaj sentimentojn kun iliaj kaj fandiĝi kun ili.

Kiam mi unuafoje tralegis la scenaron de *Ruĝa Signal-lanterno*, unuflanke mi varme amis la karakteron de Tiemej kaj sentis eĥon kun ŝi en ideologio, aliflanke mi timis, ke mi ne povos bone ludi la rolon. Tiemej en *Ruĝa Signal-lanterno* estas 17-jara knabino. Kvankam mi iom sciis la ĝeneralajn karakterizaĵojn de knabinoj en tiu aĝo, mi tamen eĉ ne

*Prezentado por kuiristoj*



vidis knabinon kun tiaj travivaĵoj kiel tiuj de Tiemej, por ne paroli pri spertado pri tio. Evidente estis grandega distanco inter mi kaj la rolo.

Post la unuafoja provludo, mi petis opiniojn de la rigardantoj. Iu diris: “Tre simila al 17-jara naiva knabino, sed ne al Tiemej.” Tion aŭdinte, mi tre maltrankviliĝis. Ekzemple, en la unua sceno, Li Juhe diris al Tiemej, ke ŝi diru al la avino, ke “... baldaŭ venos iu onklo”. En la komenco, mi ludis la rolon de Tiemej kiel tre scivoleman knabinon kiu demandadis ĉion al la patro. Laŭ mia kompreno en tiu tempo, Tiemej tiam estis dorlotata solfilino. Poste, sub pacienca helpado de gvidantoj kaj kamaradoj, mi pensis foje kaj refoje, ke Tiemej kreskis en revolucia familio kaj vidis kaj gravuris en sia memoro la revoluciajn aktivadojn de siaj avino, patro kaj “onkloj” (subteraj kompartianoj), kvankam en la komenco oni ne sciigis tion al ŝi. Kaj krome, la patro iam komisiis al Tiemej transendon de informoj. Ĉiufoje, kiam ŝi aŭdis ke iu “onklo” venos, senescepte ŝi serioze atendadis kiel plenaĝulo komision de la patro kaj la avino. Oni povas ĝuste prezenti la karakteron de Tiemej, nur se oni kaptas la karakterizaĵon, ke Tiemej kreskis en revolucia familio kaj tio frue maturigis ŝin en politiko. Konsiderante pri tio, mi opiniis, ke antaŭ ĉio mi devas zorge prezenti la “firmecon” en ŝia karaktero kaj rezigni ĉiujn teknikojn en kanto, parolo, mimiko kaj danco ne konformajn al tiu karaktero, kiel ajn belaj ili estas. En tradiciaj teatraĵoj multaj teknikoj de ludado de harligo estis aplikataj de junulinoj nur pro belaspekto. Ankaŭ Tiemej havas longan harligon. Ni ankaŭ zorgis pri beleco en tio kaj uzis ruĝan ŝnureton por ligi ĝin, tamen ne nur por paradi ludarton, sed en servo al prezentado de la enhavo.

Kvankam mi jam komprenis, ke oni ne devas senkonsidere uzi prezentan teknikon, mi tamen deviiis en alian flankon en la komenca periodo de provludado: mi pensis, ke necesas nur zorgi pri la karaktero de la rolo, kaj neglektis aplikon de tradiciaj prezentaj teknikoj de la pekina opero. Kaj pro nesufiĉa apliko de tradicia prezenta arto, mi ne povis bone reliefigi la karakteron kaj mensan aktivadon de la rolo. Poste, mi foje kaj refoje studis *Paroladojn ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ kaj pli kaj pli klare vidis, ke en ludado de operoj kun moderna revolucia enhavo, oni nepre devas kritike heredi la riĉan tradician arton de la pekina opero kaj utiligi la tradiciajn artojn por prezenti heroajn de la socialisma epoko. En ludado de la opero *Ruĝa Signal-lanterno* kaj la lastatempe surscenigitaj pekinaj operoj *Ruĝa Virina*

*Taĉmento kaj Batalado sur Ebenejo* ni uzis kaj disvolvis la tradiciajn artojn kaj teknikojn, unuapaŝe kombinante revolucian realisman enhavon kun la eminenta tradicia arto de la pekina opero. En la sceno “Akcepto de la Tasko” de la pekina opero *Ruĝa Signal-lanterno* estas kanto laŭ la melodio *hipiliuŝuj*. La teksto legiĝas jene:

*Al mia parenkar’ sennombraj onkloj apartenas,  
Sed sen afero grava ili tamen ne alvenas.  
Parencoj ili estas, tamen nekonatoj en la vera  
senco,  
Sed ili estas karaj pli ol vera sangparenco.  
Kaj paĉjo kaj avinjo ilin nomas same per  
“karulo”,  
Mi eldivenis ankaŭ iom la sekreton tra l’ nebulo:  
Al paĉjo ili ja similas,  
Iliaj koroj ĉiuj ruĝe brilas.*

La melodio *hipiliuŝuj* estas alegra muzikaĵo simila al vigla torento. Sed en la malnova pekina opero, ne zorgante pri la enhavo de la kantoj, oni ĉiam rigide uzis unu solan formulan melodion por unu kanto. Nun ni faris kuraĝan reformon en tio, aplikis alterne unu-kvar-takton kaj du-kvar-takton, konservante la tradician karakterizaĵon de *hipiliuŝuj* kaj adoptante karakterizaĵon de alia melodio taŭga por rakontado kaj esprimo de sentoj. Tiamaniere ni donis melodion al tiu kanto tute konforman al prezentado de nuntempa revoluciulo.

Koncerne al la muzikiloj de la pekina opero, ni ne nur konservis la kordajn, blovajn kaj perkutajn instrumentojn tradiciajn, sed ankaŭ aplikis nemalmultajn okcidentajn muzikilojn kiel kontrabason, violonon ktp. Ekzemple, ni pliapaŝe rebonigis la muzikon de la sceno “Lukto sur la Ekzekutejo” per tio, ke la pekinopera orkestro ludas la majestatan kaj imponan muzikon de *La Internacio*, kiam Li Juhe kaj avino Li martiriĝas. Dank’ al tiu aranĝo, la heroaj figuroj de la revoluciaj martiroj aspektas ankoraŭ pli altaj. Tiamaniere, ni enspiris novan vivon ankaŭ al la tradicia muziko de la pekina opero. Tamen koncerne al mi mem, mi ankoraŭ devas profunde penetri en la vivon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kombiniĝi kun ili kaj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ longtempe, senkondiĉe kaj tutkore profundiĝi en la ardan bataladon, por plenumi la postulojn de la Partio. Unuvorte, mi nur faris komencon en tiu flanko. Kaj ĉiufoja praktiko en tio levis min al nova alteco en mia ideologia remuldo kaj ludado de revolucia moderna pekina opero.



Foje, mi iris al Ĵanĝuang-vilaĝo de Kingjuang-gubernio, Hebej-provinco por sperti vivon. Tiu vilaĝo havas revolucian tradicion. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĝia heroo popolo brave kaj obstine batalis kontraŭ la japanaj agresantoj per tuneloj. Kune vivante kaj laborante kun la komunumanoj en pli ol unu monato, mi estis forte korusita de ilia penema laborado dum la tuta jaro, malgraŭ ventego kaj pluvado. Kelkfoje ni ludis *Ruĝan Signal-lanternon* ĉe la vilaĝfino por la komunumanoj. Kvankam ni ne havis lumigilojn kaj dekoraciojn, tamen la spektantoj ĉiam aprezis nian ludadon kun grandega intereso. Iu maljunulo diris al ni kun ĝojo kaj bedaŭro: "Kvankam mi jam vivis dekojn da jaroj, tamen mi vere komprenis pekinan operon nur hodiaŭ." Post rigardo de la opero, iu kompartiano diris emocie: "Mi nepre lernos de la heroo Li Juhe kaj ĉiam estos fidela al la Partio kaj la popolo." Aŭdinte la simplajn kaj sincerajn vortojn de ili, mi longe ne povis kvietiĝi. Mi pensis, ke

la laboranta popolo postulas literaturon kaj arton certe ne nur por amuzo, sed ĉefe por ricevi revolucian penson, fortojn kaj lecionojn de la teatraĵoj.

La komunumanoj bonege nin prizorgis en fizika laboro kaj vivado, intime invitis nin gastigi ili, nin regalis per manĝo, rigardis nin kiel iliajn karulojn kaj rakontis al ni historiojn de iliaj familioj kaj vilaĝo, kio profunde edukis nin. Post nia reveno al Pekino, ĉiufoje kiam ni renkontis malfacilon en ekzercado aŭ ludado de opero, ni sentis ke ili certe estas venkeblaj, se nur ni ekmemoris la esperojn kaj kuraĝigojn de la komunumanoj al ni. Mi nepre ne vanigos la kulturadon de la Partio kaj la popolo al mi, ludados revoluciajn modernajn operojn dum la tuta vivo kaj klopodos por fariĝi revolucia arta laboranto vere inda je tiu nomo.

---

\* *Aktorino de la Ĉina Pekin-opera Trupo.*



*Liu Ĉangju interŝanĝas sperton pri kantado kun aliaj artistoj.*

**Maŭ Zedong**  
**Paroladoj**  
**ĉe la Literatura kaj Arta**  
**Kunsido en Jan-an**

**( En Esperanto )**

*60 pĝ., Formato 14.5 × 9 cm.*

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio  
Distribuata de la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo,  
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

*( Akceptebla ankaŭ ĉe ĉiuj perantoj en diversaj landoj )*



# Prezentado por Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj



Propaganda taĉmento de ĈPLA ludas revolucion muzikajon por amasoj en la Somera Palaco de Pekino.







Geartistoj lernas de malriĉkam-  
paranoj kaj malsuperaj mezkam-  
paranoj.

*Maldekstre:*  
La ludantoj en ŝminkado

Aktoroj de la Kanto-danca Teatro  
de Vuhan prezentas la baledon  
*Ruĝa Virina Taĉmento* en kam-  
paro.







Sceno el la revolucia simfonio  
*Sagiabang*

Batalanto kantas por amaso kanton  
el revolucia modela pekin-  
opero.





# Kanti por Paŝtistoj

—Notoj pri la Ensemblo de Ĝalute-flago

**M**ATENE, la ora suno sin levas malrapide en la oriento de Horĉin-stepo, sur kiu vagas gregoj de grasaj bovoj kaj ŝafoj. Veturilo de la Ensemblo de Ĝalute-flago de Ĝelimu-ligo de Gilin-provinco sin direktas al la profundaĵo de la stepo.

## VARMA AKCEPTO DE SAJBUER

La aktoroj de la ensemblo plenanime sin dediĉas al kantado por la paŝtistoj kaj starigis profundan amikecon kun ili.

Iutage, ili rapide veturis en ĉevala ĉaro al Sajbuer-brigado. Aktoroj de la mongola nacieco kantis *Bela Estas Mia Hejmloko* kun simpla, nevariema melodio. Kiam ili estis pli ol 20 liojn for de la brigado, dekoj da ĝiaj paŝtistoj galope alrajdis sur fortaj ĉevaloj por ilin renkonti.

“Bonvenon al vi, gekamaradoj!”

La ĝojkrioj de la paŝtistoj stimulis la membrojn de la ensemblo, kiuj laŭte kriis unuvoĉe: “Salutojn al la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj!”

La rajdantoj gvidis la veturilon rekte al la oficejo de la brigado. Tuj kiam la aktoroj descendis la

veturilon, la gastamaj paŝtistoj tuj kondukis ilin je la manoj en siajn jurtojn por ripozo.

Kiam noktiĝis, brilaj steloj iluminis la firmamenton. En la vasta korto de la brigada oficejo svarmis homoj, el kiuj iuj sidis surtere kaj aliaj sur ĉevaloj. Ili formis duonan cirklon, kio estis la scenejo por la prezentado en tiu nokto.

Kiam komenciĝis la prezentado, varmaj manklakoj de la paŝtistoj stimulis la aktorojn. La *haŭlibaŭ* (speco de mongola kanto) kantata de Lahi-aŭsier je la propra akompanado de kordmuzikilo estis aparte varme akceptita de la spektantoj. La paŝtistoj de Sajbuer tre bone konas tiun popolan artiston sur la stepo. En 1942, li naskiĝis en jurto proksime de Sajbuer. En la mizeroplenaj tagoj, lia patro servanta al brutoposedanto ne havis monon por aĉeti tolon por vindi la malgrandan Lahi-aŭsier kaj tiu ĉi devis kreski en ŝaffelo. Kiam li estis 11-jara, li jam komencis lerni ludadon de kvarkorda muzikilo kaj kanti pri la pasintaj mizeroj kaj la hodiaŭa feliĉo sur la stepo. En 1965, li veturis al Pekino kune kun iu ensemblo por raporta prezentado kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.



Reveninte al Horĉin-stepo, li verkis multajn *haŭlibaŭ*-ojn prikantantajn Prezidanton Maŭ. Kiam ĈPLA-anoj venis al la stepo por subteni maldeks-trulojn, li verkis *Kanto al la Popolaj Armeanoj* kaj kiam fondiĝis la revolucia komitato, li verkis *Kvar Maljunuloj Laŭdas la Revolucionan Komitaton*. Paŝtistoj diris: “La kantoj de Lahi-aŭsier vere esprimis nian koran senton.”

Dum ĉifoja prezentado, li verkis alian novan kaj li kantis je akompano de la korda muzikilo en siaj manoj:

*Degelas la glaci' sur Hanŝan-monto, ĉar la  
ruĝa suno ardas,  
La vastan stepon de mil lioj nun Maŭzedongpenso  
vartas.*

*Kiel ajn furiozaj ŝtormoj ekaperos,  
La suna brilo certe ilin fine jam forpelos.  
Ho, Prezidanto Maŭ! Prezidanto nia!  
La popolanoj de la stepo ĉiam marŝos laŭ  
revoluci-linio via.*

### LA KANTODANCO “ULANHADA”

La vasta Horĉin-stepo estas aktivada tereno de la Ensemblo de Ĝalute-flago kaj ankaŭ ĝia fonto de

artaj kreaĵoj. En la pasinta pli ol unu jaro, ili kreis multajn kantojn kaj dancojn. La kantodanco *Ulanhada* estas unu el iliaj kreaĵoj.

Ulanhada estas grava strategia loko ĉe la landlimo. Tie estas milica kompanio el virinoj lertaj en rajdado kaj pafado. Tiu kompanio interlernas kaj interhelpas kun la oka kompanio de iu trupo de ĈPLA, garnizonanta ĉe tiu loko, kombinante laboradon kun milita ekzerco. La programero *Ulanhada* ĝuste priskribas ilian kunan gardadon de la landlimo.

En varma senventa tago de komenca vintro, la ensemblo venis kun la programero al Ulanhada je la tria fojo por ke tieaj paŝtistoj ĝin juĝu.

Komenciĝis la prezentado. Akompanate de la impona temo-kanto, taĉmento da fortaj ĈPLA-aj batalantoj kaj taĉmento de bravaj milicianoj kune prezentis dancon pri kuna gardado de la landlimo. Poste, iu maljuna paŝtisto iris al la mezo de la scenejo. Akompanate de trista melodio de kordmuzikilo, la maljunulo kante rakontis:

*Dancado kaj kantado por mongoloj*





*Sciu vi, ke Hajibala estas mia nomo.  
Mi cikatroplena sklavis dum la vivduono.  
En malnova la infera sociaĉo nigra,  
La damninda ĉeflamo kaj la princo tigra  
Mian karan patron murdis per kruela bato  
Kaj l' patrinon brulmortigis tute sen kompatato...*

Dum la plendado de Hajibala sur la scenejo, iu maljuna paŝtisto sub ĝi viŝadis larmojn kaj atente rigardadis la prezentadon. Li estas la vera Hajibala, priskribita en la teatraĵo kaj lia nomo estas Huhobala. Kiam li estis 12-jara, la princo kaj ĉeflamo forkaptis lian patrinon kaj vive bruligis ŝin kiel oferon al la princedzina moŝto. De tiam malgranda Huhobala fariĝis sklavo de la princo kaj laboregis kiel ŝarĝbruto. Disiĝis la nigraj nuboj kaj ruĝa aŭroro aperis en la oriento. Lia hejmloko liberiĝis kaj li aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Poste, li demobiliziĝis kaj revenis al la stepo.

En kunsido post la prezentado, maljuna Huhobala diris emocie: “Estas Prezidanto Maŭ, dank’ al kies gvido ni akiris la hodiaŭan feliĉan vivon. De nun, ni nepre konstruos kaj defendos la limregionon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ!”

La vortoj de la maljuna paŝtisto stimulis la du mongolajn knabinojn starantajn ŝultro-ĉe-ŝultre apud li, unu el kiuj estis Ĝalagahu, estrino de la milicanina kompanio kaj la alia estis Gin Lian, ludanto de la rolo de estrino de la milicanina kompanio de Ulanhada. Ili levis siajn manojn kaj kriis unuvoĉe: “Altigi la singardemon, defendi la patrinon.” Kiam unuafoje la ensemblo venis al Ulanhada por verki la libreton, Gin Lian kaj Ĝalagahu jam fariĝis intimaj amikinoj. Ili kune laboris kaj faris militajn ekzercojn. La revolucia spirito de Ĝalagahu infektis Gin Lian, kaj tiu ĉi decidis bone prezenti la figuron de Ĝalagahu. Endormiĝis la loĝantoj sur la stepo. Ŝi ekzercis dancon en lunlumo, korektante siajn movojn laŭ la ombro kaj fine kreis figuron de brava estrino de milicanina kompanio. Maljuna paŝtistino onklino Deligerma diris al ŝi elkore: “Knabino, memoru ke en via aĝo mi eĉ ne havis kaptukon. Nun, vi surportas belajn vestojn similajn al ĉielarko. Bone kantu, filino, por la paŝtistoj!”

## KANTI POR LA PAŜTISTOJ

La Ensemblo de Ĝalute-flago estis fondita en januaro de la pasinta jaro. Laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ, ili varme faris prezentadon por

la paŝtistoj. La paŝtejoj, gardejoj, pontokonstruejo kaj jurtoj estas lokoj por ilia prezentado. Foje, post ilia prezentado ĉe Nimulagi-brigado, ili informiĝis, ke iu avino ne vidis la prezentadon. La membroj de la ensemblo do venis al ŝia jurto kun muzikiloj.

“Avino, ni venas por fari prezentadon por vi.”

“Por mi!?”

“Ĉar vi ne vidis nian prezentadon, tial ni speciale venas por tion fari.”

“Por mi sola!?”

Kiam la avino ankoraŭ miris, aktorinoj jam sidigis ŝin sur feltan kusenon. Kvankam en la malgranda jurto estis nur unu sola rigardanto, la aktoroj tamen ludis tre serioze kaj kantis kortuŝe.

Post la fino de la prezentado, la avino diris al ili kun larmoj: “Korajn dankojn al Prezidanto Maŭ, ke mi almozulino en la malnova socio, ĉie sentas varmon en la nova socio. Kvankam mi ne havas gefilojn, mi tamen ne sentas solecon!”

Por fari prezentadon por la paŝtistoj, la ensemblo devas batali kontraŭ malfaciloj. La 22-an de oktobro 1971 neĝegis. Por ebligi al nombro da popolanoj vidi ilian prezentadon, la membroj de la ensemblo marŝis malgraŭ neĝado, laŭ la fiksita tempo.

Kiam ili alvenis al Hiaŭgingzi-brigado de Jihekomunumo, la paŝtistoj estis surprizitaj. Iu maljuna paŝtisto diris: “Ni ja ne atendis, ke vi venas eĉ en tia vetero.”

La aktoroj amas la paŝtistojn kaj la lastaj ankoraŭ pli amas la aktorojn. Dum la prezentado, la paŝtistoj timis ke la aktoroj malvarmumiĝos, ili do klopodis ŝirmi ilin de la frosta vento. Li Bo, Hasi kaj Jiŝa estis novaj aktorinoj ĵus aliĝintaj al la ensemblo. Unuafoje ili faris prezentadon eksterdome en tia vetero. Kvankam la vetero estis malvarma, la entuziasmo de la paŝtistoj tamen tiel tuŝis ilian koron, ke ili ludis pli serioze kaj bele.

La kantoj kaj dancoj de la ensemblo disvastigas Maŭzedongpenson inter la paŝtistoj kaj riĉigas ilian kulturan vivon. Hodiaŭ, paŝtistoj sur Horĉin-stepo ofte ĝoje kantas:

*En suna bril’ sovaĝlilioj ruĝe montras sin,  
Horĉin ligiĝas firme kun Pekin’,  
Al Tian-anmen rigardas ni sur Hanŝan-mont’.  
Popolo de Ĝelimu firme sekvos vin,  
Granda gvidanto Maŭ Zedong!*

# Scienca Esploro Frukta

## Dank' al Praktikado

**M**I estas biologia profesoro de Ĝongŝan-universitato. Antaŭ la kultura revolucio, mi okupiĝis ankaŭ pri scienca esploro, krom instruado. Sed tiutempe, sub la influo de la malnova eduka sistemo, la scienca esplorado farata en domoj disiĝis de la proletara politiko, de la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj de la produkta praktiko. Mi ne klare konsciis, por kio ni faris sciencon

esploron. Tio estas la fundamenta kaŭzo de mia devio de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En somero de 1969, mi partoprenis en la Praktika Taĉmento de Eduka Revolucio de Entomologio de la Biologia Fakultato. En la komenca periodo post ĝia fondiĝo, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri esplorado, mi iris kune kun junuloj en fabrikojn,



*Profesoro Pu Ĝelong en sia laborĉambro*





*Profesoro Pu Ĝelong esploras leĝon de la vivo de liĉiaj fetoraj cimoj kun siaj lernantoj.*

konstruejojn kaj forstokulturejojn por informiĝi pri eliminado de fiinsektoj kaj utiligo de bonaj insektoj en produkta praktikado. Dum enketado ni informiĝis, ke serioza plago de fiinsektoj alportis certajn minacon kaj perdon al agrikulturo kaj forstokulturo. Kvankam ĉiujare oni batalis kontraŭ rizborantoj (*Schoenobius incertellus*) en Guangdong-provinco, tamen oni ne povis elimini plagon de ili. En 1967, ili forkonsumis 350,000 tunojn da rizo, kio sufiĉas por nutri pli ol milionon da homoj dum unu tuta jaro, kaj krome ili ankaŭ formangis la foliojn de multaj pinarbaroj. La amasoj de laboristoj kaj kamparanoj deziris, ke ni trovu rimedon por pli efike elimini fiinsektojn kaj garantii riĉan rikolton de agrikulturo kaj kreskado de arbaroj. Rigardante la senfoliigitajn pinarbojn de la vasta detruita arbaro, mi sentis doloron en la koro.

En la pasinteco, mi nur studadis super teorio kaj materialoj, sed en solvado de efektivaj problemoj en produktado kaj scienca eksperimentado mi tre ofte trovis min senpova. En tiu enketado, mi profunde komprenis, ke specialistoj devas sin ĵeti en

praktikon, sincere lernadi de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, komplete remuldi sian mondkoncepton, transigi sian starpunkton al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ilin servadi dum la tuta vivo.

Dongguan estas la gubernio kun plej disvolviginta kulturado de liĉioj en Guangdong-provinco. Ĉiujare, granda kvanto da liĉioj estas eksportita. Sed en tiu loko, liĉiarboj ofte estis atencataj de liĉiaj fetoraj cimoj (*Tessarotoma patillosa*) kaj la produktokvanto estis reduktita. Kvankam oni atingis certan sukceson en ekstermado de tiu fiinsekto per insekticido, tamen ne povis tute ilin elimini kaj krome la apliko de insekticido influis la aktivadon de la abeloj kaj malpliigis la produktokvanton de mielo. La amasoj deziris akiri altefikan kaj ekonomian metodon por preventi kaj elimini tiajn fiinsektojn. Pro tio, en Dongguan-gubernio la Praktika Taĉmento de Eduka Revolucio de Entomologio starigis kurson pri preventado kaj eliminado de fiinsektoj en kunlaboro kun loka lernejo. Kombinante instruadon, sciencajn esploron kaj produkton, ka-



droj, kamparanoj kaj teknikistoj faris kune amasan scian eksperimenton pri ekstermado de liĉiaj fetoraj cimoj per platventraj parazitaj (*Anastatus gastropachae*). Post klopodado dum pli ol duona jaro, la liĉiaj fetoraj cimoj en la eksperimentaj lokoj estis subpremitaj kaj malofta riĉa rikolto estis akirita en nemalmultaj eksperimentaj kampoj. La komunumanoj tre ĝojis, kaj ankaŭ mi tre emociiĝis, ĉar nia scienca laboro unuapaŝe adaptiĝis al la bezonoj de la lokaj komunumanoj.

Por fari la scian eksperimenton pri ekstermo de liĉiaj fetoraj cimoj per platventraj parazitaj, ni konstruis simplan kabanon kun rizpajla tegmento laŭ la konkretaj kondiĉoj en la kamparo, por prove generi platventrajn parazitajn. En la komenca periodo, la procento de parazitaj estis malgranda, estis malmultaj inoj inter ili kaj senĉese kreskis la nombro de mortaj platventraj parazitaj. Kvankam mi partoprenis en tia esplora laboro en la pasinteco, tamen mankis al mi sperto en praktiko. La plejparto de la kamaradoj neniam kontaktiĝis kun tio kaj iuj el ili ne havis sufiĉan memfidon en entrepreno de tiu eksperimento. Kaj mi? Aperis en mia kapo la penso iri la malnovan vojon, nome fari la ŝlosilajn partojn de la eksperimenta laboro en la moderna laboratorio de entomologia ekologio de Ĝongŝan-universitato por garantii, ke en printempo oni povos dislokigi platventrajn parazitajn. Sed aliaj kamaradoj insistis fari eksperimentadon ĉeloke. Mi foje kaj refoje pensis pri tio kaj konsciis, ke se oni ne povos sukcesigi tiujare la eksperimenton per simplaj rimedoj en la kamparo, sed faros la laboron en moderna laboratorio kiel antaŭe, tiam la grandarea apliko de tiu parazito devos esti prokrastita je ankorau unu jaro. Tio estas kontraŭa al la ĝenerala linio por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. Kaj krome, grandkvante generigi platventrajn parazitajn per homa arto por elimini fiinsektojn estas scienca tekniko ne sukcesinta en la pasinteco. Se nia eksperimento sukcesos, ĝi havos certan signifon. Do mi firmigis mian memfidon kaj daŭrigis la eksperimentadon en la kamparo.

Tiam jam estis decembro. Ni devis en la mallonga tempo antaŭ la komenco de marto generigi la tutan kvanton de bezonataj platventraj parazitaj. Ni serioze analizis diversajn fenomenojn dum la generado de la parazitaj kaj trovis ke mankas necesaj kondiĉoj por la evoluado de ilia vivo. Tiuj kondiĉoj estas varmo, lumo, nutraĵo kaj aero. Kaptinte la nodon de la problemo, ni mobilizis ĉiujn por trovi solvon. Kvankam mi estis relative aĝa, tamen mi kune kun la junuloj ellitiĝis ĉiutage antaŭ elkre-

puskiĝo, por observado en la bredejo kun elektra torĉo en la mano. Ĉiufoje kiam mi vidis, ke la parazitaj vigle moviĝas, mi sentis neeldireblan ĝojon en la koro. Fine en marto de 1970, granda kvanto da platventraj parazitaj estis dismetitaj, la liĉiaj fetoraj cimoj en la eksperimentaj lokoj estis ekstermitaj kaj relative granda rikolto estis akirita. Mi profunde sentis, ke tio estas frukto akirita de intelektuloj en kombino kun laborantaj amasoj. La nova tekniko de eliminado de liĉiaj fetoraj cimoj per platventraj parazitaj estis ekposedita de komunumanoj nur en la duona jaro ĉefe pro la disvolvo de amasa eksperimentado. Dank' al partopreno de la eksperimenta laboro, la komunumanoj rapidigis la aplikon de la rezulto de scienca esploro en praktikan produktadon kaj kontrolis la ĝustecon de la rezulto de la scienca esploro. Kaj krome, laŭ siaj spertoj en produktado, ili faris proponojn por plibonigo de tekniko kaj elmetis novajn teoriajn problemojn kaj per tio montris novan direkton en scienca esplorado.

En la periodo de julio ĝis novembro de 1971, mi partoprenis en la resumado de spertoj pri eliminado de rizborantoj per baciloj fare de komunumanoj en Mejhian-gubernio de Guangdong-provinco, kaj ricevis profundan edukon. Mi pli bone komprenis la gravecon de partopreno de laboristoj kaj kamparanoj en sciencaj eksperimentoj. En la lastaj 2-3 jaroj, oni vaste uzis kontraŭrizborantajn bacilojn en diversaj lokoj de nia lando por elimini fiinsektojn kaj akiris valoran sperton en tio. La efiko de eliminado de rizborantoj per tia bacilo estas ne tiel stabila. En 1971, okazis eksterordinara plago de rizborantoj dum la kreska periodo de frua rizo en Guangdong-provinco. La komunumanoj kaj sciencaj teknikistoj de Mejhian-gubernio sukcese eliminis rizborantojn per tiaj baciloj kaj akiris plej abundan rikolton de frua rizo. Dank' al prizorgo de la partia komitato de Mejhian-regiono oni ĝustatempe faris eksperimenton de eliminado de rizborantoj per baciloj sur pli ol 3,300 hektaroj da kampoj de malfrua rizo kaj ricevis rimarkindan rezulton. La kreo de la komunumanoj kaj teknikistoj de Mejhian donis bonan ekzemplon en ekstermado de rizborantoj per tiu metodo. Ni serioze resumis la valoran sperton de la scienca eksperimento en tiu regiono.

La pli ol dujara partopreno de scienca eksperimento konvinke montris al mi la gravan signifon de partopreno en la tri grandaj revoluciaj bataloj fare de intelektuloj. Mi firme decidis antaŭenmarŝi en la direkto montrita de Prezidanto Maŭ kaj kontribui mian forton al la entomologia studo de nia patrolando.



*La hodiaŭa Guolikoŭ*

## Fiŝista Vilaĝo ĉe Bajjang-lago

ĜANCUN

**D**UM la Kontraŭjapana Rezistmilito, sub la gvido de la Partio, la popolanoj ĉe Bajjang-lago en Hebej-provinco sin organizis en surakva kontraŭjapana gerila taĉmento, sange batalis kontraŭ la agresantoj per memfaritaj fusiloj kaj kanonetoj, eĉ per fiŝistaj forkoj kaj falĉiloj kaj faris neforviŝeblajn meritojn en la milito. Guolikoŭ estas ordinara fiŝista vilaĝo ĉe la lago, kie la taĉmento faris batalon.

Kaj nun, ĉie regas vicleco kaj prospero en la vilaĝo: Bonorde staras vico post vico da novaj domoj, alte sin levas en la vilaĝa centro akvoturo, sur kiu disaŭdigilo ofte informas la vilaĝanojn pri gravaj aferoj enlandaj kaj internaciaj kaj bruas maŝinoj en la grenprilaborejo apud la vojo...

Antaŭ la Liberiĝo, al la vilaĝo ĉiam mankis greno kaj ĝi estis multe pli kara ol la fiŝo. Sed nun, Guolikoŭ-brigado ne nur povas plene provizi sin per memproduktita greno, sed ankaŭ havas superfluan por vendi al la ŝtato. En 1971 la brigado vendis pli ol 50,500 kilogramojn da greno.

Kiel okazis la ŝanĝiĝo?

Veturante per boato norden de la vilaĝo, de malproksimo ni vidis longan digon serpentuman sur la lago. Kvankam la kamparo estas malalta je ĉirkaŭ 0.5 metro ol la akvo en la lago, tamen grenplantoj interne de la digo bone kreskas.

Post la finiĝo de radikala ordigo de la rivero Hajhe, stabiligis la akvonivelo de la lago kaj fun-



damente eliminiĝis la minaco de inundo. Samtempe kun disvolviĝo de akvoproduktaĵoj, la vilaĝanoj de Guolikoŭ-brigado energie entreprenis la grenprodukon sub gvido de la partia filio. Sed iu diris: "la ŝtato certe donas al ni grenon. Estas sufiĉe por ni, ke ni havas fiŝojn por manĝi kaj fragmitojn por vendi. Kial ni ĝenas nin per malfacilaĵo?" Ankaŭ alia diris: "Ĉe ni troviĝas nur akvo senlima sed ne kamparo. Estas neeble por ni produkti grenon, krom se la rizospikoj kreskus sur fragmitoj!" La partia filio organizis la vilaĝanojn serioze diskuti pri la graveco de grenproduko en akva regiono, por ke ili ĉiuj tion bone komprenu. Sekve ili decidis konstrui digon sur la malprofundejo en la lago, forĉerpi la akvon interne de la digo kaj planti tie grenon.

Komenciĝis la laboro. Ili elfosis kotomasojn per ŝovelilo el la fundo de la lago profunda je pli

ol 1 metro. Spite al printempa frosto, ili persistis labori en akvo kun glacifosaĵoj. Ili alportis per boatoj 155,000 kubmetrojn da koto kaj konstruis digon altan je 3 metroj kaj longan je 9 kilometroj, tiel ke pli ol 2,300 muoj (1muo=1/15 hektaro) da kampoj estas kreitaj. Ili ankaŭ elpumpis la akvon antaŭ la kultura tempo kaj transplantis rizplantojn en pli ol 1,300 muoj da rizkampoj.

Senĉese disvolviĝas ankaŭ la fiŝkaptado kaj flankokupa produkto. Sur la lago, kie la gerilanoj forte punis la japanajn agresantojn, nun naĝas grasaj anasoj, veturas vico post vico da boatoj plenŝarĝitaj de mato kaj el la akvo jen kaj jen saltadis karpoj orbrilantaj. Eĉ en vintro, ankoraŭ multaj homoj kaptas fiŝojn per retoj, kantante fortajn ho-ruk-ojn kaj belajn kantojn. Pasis por ĉiam la antaŭaj mizeraj tagoj, en kiuj oni devis remadi boaton kaj kapti fiŝojn kun malsata stoma-

### *Konstruado de digo por krei kampojn*





ko. Nun la vilaĝanoj laboras diligente kaj memfide por krei sian ankoraŭ pli prosperan estontecon.

En 1971 la brigado liveris al la ŝtato pli ol 50,000 kilogramojn da fiŝoj. Ĉiuj produktgrupoj de la brigado konstruis fiŝbredajn lagetojn kaj samtempe bredis multajn anasojn. La Unua Produktgrupo sola bredis jam pli ol 1,000 anasojn kaj vendis al la ŝtato 40,000-50,000 anasovojn en la lasta jaro.

Kun la disvolviĝo de produkto, la komuna akumulita kapitalo de la brigado kreskis ĝis pli ol 353,800 juanoj. Por pligrandigi la produkton, en 1971 ili aĉetis elektrajn motorojn, 16 dizelojn kaj 30 aliajn maŝinojn kaj ekipaĵojn. Pli ol 1,600 muoj da kampoj povas esti irigaciataj per maŝinoj. Krome oni uzis maŝinojn ankaŭ en muelado kaj draŝado.

Plimultiĝis la kolektiva enspezo kaj ankaŭ pliboniĝis la vivo de la komunumanoj.

Ni vizitis la familion de eksgerilano martiro Deng Ĵuji. Sur la ligna ŝranko sidas 6-transistora radioricevilo, vekhorloĝo tiktakas sur la vestokesto kaj en la apuda ĉambro estas kudromaŝino. La familio de la martiro nun havas 21 membrojn, inter kiuj troviĝas 2 armeanoj, 2 laboristoj, 1 studento, 5 liceanoj kaj lernantoj de elementa lernejo. Antaŭ la Liberigo la familio havis nur 4 anojn kaj posedis nur 1 ĉifonitan litkovrilon. Nun 15 familianoj, kiuj restas en la hejmo, loĝas en 7 ĉambroj, havas 28 litkovrilojn kaj matracojn.

En la brigado nun troviĝas 86 radioriceviloj, 55 kudromaŝinoj kaj 193 horloĝoj. La Tria Produktgrupo havas 45 familiojn el kiuj 44 konstruis novajn domojn. Escepte de 3 familioj, ili ĉiuj havas ŝparmonon.

Ankaŭ la kultura kaj eduka afero de la vilaĝo ricevis grandan disvolviĝon. La vilaĝo starigis lernejon kun 400-500 lernantoj kaj amatoran propagandan trupon, kiu povas krei kaj ludi artajn prezentaĵojn. La amatora sporta teamo ofte ludas korbopilkon, volejbalon, volanon kaj tablotenison. La milicanoj ofte sin ekzercis per glaciĝlitado, naĝado kaj trapasado de akvejo kun armiloj ĉe la antaŭaj batalejoj sur la lago.

La brigado fondis kuracejon kaj ĉiuj produktgrupoj havas ofte uzatajn kuracilojn. Malsanetoj kaj vundetoj povas esti kuracataj ĉeloke. Krome oni povas ĝenerale ricevi injekton ĝustatempe kontraŭ infektaj malsanoj, tial la vilaĝanoj havas bonan sanon.



*Milita ekzercado de milicanoj*

*Fiŝkaptado en vitro*



# Eldono de Novaj Libroj kaj Bildoj

Lastatempe la Komerca Eldonejo reel-  
donis la libron *Marks, Engels, Lenin kaj  
Stalin pri la Klasika Filozofio de Germanio*.  
La Popola Eldonejo reprenis la verkojn  
*Memoroj pri Lenin* de N. K. Krupskaja,  
*La Komunuma Historio de la Jaro 1871*  
de H. P. O. Lissagaray, *Akuzi Faŝismon*  
de G. M. Dimitrov kaj *Memorigo je la  
Tricentjara Datreveno de la 1644-a Evento*  
de Guo Moĵuo kaj nove eldonis la poli-  
tikajn kaj infanajn legaĵojn *Notoj pri la  
Historiaj Eventoj kaj Personoj Menciitaj  
en la Kvin Filozofiaj Verkoj de Prezidanto  
Maŭ*, *Amikeco Disfloras en la Tablotenisa  
Sporto de Azio kaj Afriko kaj Kreskado  
sub la Nutrado de Maŭzedongpenso*.

La kolekto de rakontoj *Sturmi Antaŭen*,  
eldonita de la Polola Literatura Eldonejo,  
enhavas 26 verkojn de amatoroj de ĈPLA,  
kaj la noveloj *Milicaninoj sur Insulo*,  
*Bolado en Montaro*, *Gaŭ Jubaŭ* k.a. unua-  
foje aperintaj antaŭ la Granda Proletara  
Kultura Revolucio, estas reeldonitaj post  
revizio.

Inter la bildrakontoj nove verkitaj kaj  
eldonitaj de la Popola Belarta Eldonejo,  
sin trovas *Unu Arĝenta Monero*, malka-  
ŝanta kaj akuzanta la pezan subpremon  
kaj kruelan ekspluaton kontraŭ la labo-  
ranta popolo en la damninda malnova  
socio, *Li Vejĉaŭ*, *Modela Bredisto Je  
Honghaj* kaj *Dan Zeng* pri laŭdindaj faroj  
de ĈPLA-aj modeloj, *Kontraŭjapana Hero-  
eto* kaj *Sekreto sub Melonplantaĵoj* por  
infanoj, *Julongba* kaj *Ŝen Hiukin* — *Bona  
Ekzemplo de Daŭriganto de la Proletara  
Revolucia Afero*, kiuj rakontas avangar-  
dajn farojn de intelektaj junuloj irintaj de  
urboj al la kamparo. Inter la nove ver-  
kitaj novjaraj bildoj sin trovas *Ĉiam Varn:e  
Ami Prezidanton Maŭ*, *Triumfa Kanto de*

*Unuiĝo kaj Venko de Armeo kaj Popolo  
kaj la Irigacia Kanalo Ruĝa Flago*.

Laŭ la principo elmetita de Prezidanto  
Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la  
nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo  
al Ĉinio**”, la Popola Belarta Eldonejo  
zorge presis kaj eldonis la unuan volumon  
de *Historiaj Restaĵoj Elfositaj dum la Gran-  
da Proletara Kultura Revolucio* kaj la al-  
bumo *La Vojo de Silkaĵoj: Ĝonghua-  
eldonejo kolektis nombron da historiis-  
toj por ordigi kaj interpunkcii la Dudek  
Kvar Kronikojn*, el kiuj eldoniĝis lasta-  
tempe la *Kroniko de Ĝoŭ* kaj *Kroniko de  
Suda Ki*. La Komerca Eldonejo repren-  
is ĉinan tradukaĵon de *Antikva Socio*  
de L. H. Morgan.

Krome, eldonejoj de specialaj fakoj  
eldonis ankaŭ ĉirkaŭ 80 librojn de scien-  
coj kaj teknikoj pri praktikaj spertoj en  
produkta batalo kaj sciencaj eksperimen-  
toj.

*Infanoj legas novan  
eldonaĵon por infanoj*






# “Spirito de Longgiang”

—Prezentata de la Teatra Grupo de “Spirito de Longgiang”  
de la Ŝanhaja Pekinopera Trupo



Giang Ŝujing, sekretario de la partia filio de Longgiang-brigado, helpas brigadestron Li Ĝitian elimini grupan egoismon.






Giang Šujing donas bonan ekzemplon en barado de la rivero Giulonggiang por savi la regionon en trosekeco laŭ la decido de la partia komitato de la gubernio.





Hiaŭhong, kiu venis de regiono en trosekeco al Longgiang-vilaĝo, tenante tason da akvo ekpensas la vortojn de sia avino: "Eĉ taso da akvo povas savi kelkajn plantidojn."

Longgiang-anoj baras la torentan fluon per siaj korpoj por certigi kunigon de la du partoj de la digo.



La maljuna malriĉkamparano Onklo Agian firme subtenas la decidon de la partia komitato de la gubernio pri barado de la rivero por savi la regionon en trosekeco.





Komunumanino Onkino Panšuj  
en la plagita regiono

Longgiangbrigado decidis helpi per  
senditaj homoj la plagitan regionon  
en batalo kontraŭ trosekeco.





# Zigong — Produktejo de Putosalo

**A**NTAŬ nelonge ni vizitis la urbon Zigong, kiu estas fame konata en Ĉinio kiel produktejo de putosallo.


Zigong estas urbo de Siĉuan-provinco en sudokcidenta Ĉinio. En tiu regiono estas riĉaj fontoj de roksalo kaj flava kaj nigra sallikvo, kiuj estas materialo por prepari salon kaj aliajn kemiaĵojn. Kaj krome, sin trovas tie tergaso, kiu estas grava

materialo de kemia industrio kaj ankaŭ uzata kiel hejtajo por prepari grandan parton de la salo de tiu urbo.

Antaŭ pli ol mil jaroj, la tiea laboranta popolo de nia lando jam fosis putojn kaj preparis salon en tiu loko per sia aparta metodo, tiel ke Zigong fariĝis saloprodukta urbo. De multaj jaroj, ĝi provizas per sia salo la bezonon de la popolo en sudokcidenta Ĉinio kaj aliaj regionoj. Post la

*Sallaboristoj de Zigong energie entreprenas sintezan utiligon de salo. La scienca grupo de laboristoj, teknikistoj kaj kadroj ekzamenas la kvaliton de diklorida metano produktita de ili.*





*Sallikvo ŝprucas el  
la nove borita puto.*

Granda Proletara Kultura Revolucio, okazis novaj ŝanĝoj en Zigong.

Ni vizitis iun salpreparejon kaj vidis, ke en ĝia alta domo staras kvar gigantaj cilindraj ujoj kaj multaj tubolinioj kruciĝas unuj kun aliaj. Iuj laboristoj estis observantaj mezurajn aparatojn kaj aliaj estis reguligantaj valvojn. Iu laboristo diris al ni, ke ĝi estas la unua salpreparejo funkciigata de vakuaj ekipaĵoj en Zigong. Ĝi estis konstruita en la kultura revolucio kaj la kvar cilindraj ujoj estas vakuaj vaporigiloj.

Post la Liberiĝo, oni faris plurfojan reformon al la teknologio de salopreparado en Zigong, tamen la produkta metodo restis postĝinta tiel, ke la laboristoj devis manipuli pezan saloŝovelilon ĉe la kaldronejoj. En la kultura revolucio, liberigita estis la penso de la laboristoj, kiuj venkis diversajn malfacilojn kaj elfaris tiujn ekipaĵojn por preparado de salo per vakua metodo.

La plej granda malfacilo kiun ili devis venki en farado de la ekipaĵoj estis tio, ke mankis al ili forĝa premilo por fari la supran kaj fundan parton de la konusa ujejo. Maljuna laboristo Liaŭ Jucaj kaj aliaj 7 laboristoj kune faris simplan modelon, metis varmigitan ŝtalplaton sur ĝin kaj komencis frapigi per marteloj. Ĉiutage ili marteladis dek-milon da fojoj senĉese, kaj post pli ol cent tagoj de martelado ili fine sukcesis en elfarado de la supraj kaj fundaj partoj de la konusaj ujejoj.

Dank' al apliko de la vakuaj ekipaĵoj por preparado de salo, la laborproduktivo plialtiĝis je duoblo, la produktokosto malaltiĝis je 20 procentoj kaj krome oni povas akiri grandan kvanton da kemiaj materialoj, tio malpezigis la laboron kaj plibonigis la produktajn kondiĉojn de la salopreparaj laboristoj.

Ĉe unu el la manipulejoj de la laborejo, iu junulino estis observanta mezurajn aparatojn. Ŝi nomiĝas Kiu Juhian. Ŝia patro estas emeritiĝinta laboristo, kiu laboris 37 jarojn. Foje la maljuna laboristo de salopreparado venis al la laborejo de sia filino, post kiam la vakuaj ekipaĵoj ekfunkciis, kaj diris emocie post rigardo pri ĝi: "Kiel feliĉa vi estas! Dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ ni havas la hodiaŭan feliĉon!" Je sia foriro, li foje kaj refoje diris al sia filino, ke ŝi bone aŭskultu la vortojn de la Partio, bone lernu de la majstroj kaj posedu la novan metodon de salopreparado por multe produkti salon por la ŝtato.

Ĉe malvarmiga cirkuliga pumpilo, streĉe laboris maljuna laboristo Huang Ŝaŭjong. Liaj familianoj estas salo-laboristoj de multaj generacioj. Antaŭ la Liberiĝo, liaj patro kaj frato mortis de turmentado fare de kapitalistoj. Huang Ŝaŭjong malfacile vivis en suferoj ĝis la Liberiĝo. Hodiaŭ li jam mem posedas la teknikon de mekanika preparado de salo. Vidante, ke blanka salo falas el la ŝprucigilo en la tago de ekprodukto, li tiel emociiĝis, ke li levis salon ambaŭmane kaj diris kun larmoj en la okuloj: "Fine venas tiu tago!"



Nun, en Zigong jam konstruiĝis 3 salopreparejoj funkciigataj de vakuaj ekipaĵoj, kaj la 4-a kaj 5-a estas en konstruado. La laboristoj firme decidis anstataŭigi la ekzistantajn kaldronojn per vakuaj saloprepariloj.

En la lastaj jaroj, kun la rapida disvolviĝo de salprodukto, aperis la problemo de malsufiĉa provizo de sallikvo. La laboristoj unuflanke reformis la teknologion de elterigo de sallikvo kaj ekspluatis la latentajn fortojn de la malnovaj salputoj, aliflanke malfermis novan fonton de materialo. Geologiaj laborantoj en la regiono de Zigong trovis riĉan minon de roksalo. En junio de 1970, la revolucia komitato de Zigong kolektis oficistojn kaj laboristojn de dekoj da unuoj por ekspluati la novan salminon de Ĉangŝan. Ili fosis profundajn putojn, instalis tuboliniojn kaj plenumis konstruadon por elterigi kaj transporti sallikvon nur en iom pli ol unu jaro. En la tago por prova funkciigo de la ekipaĵoj, motoroj bruis en la pumpejoj por elterigo de sallikvo. Klara rivera akvo estis pumpita en salputojn profundajn je pli ol 900 metroj kaj el aliaj salputoj ŝprucis sallikvo, kiu estis transsendata al diversaj salpreparejoj tra la tubolinioj kun longeco de pli ol 60 kilometroj. Tiamaniere, ili havigis novan fonton de materialo al la disvolviĝo de la salproduktado de Zigong.


Por krei pli multe da riĉaĵoj por la ŝtato, la salolaboristoj ekstraktis multajn kemiajn produktaĵojn el la uzita likvo kaj feĉoj ricevitaj post preparo de salo kaj per tio faris novan kontribuon al la socialisma konstruado de la patrolando.

La Salpreparejo de Ĝanggiaba estis sin okupanta sole pri preparado de salo en la komenco. Poste ĝi komencis sintezan utiligon de la materialo kaj iom post iom ĝi transformiĝis en fabrikon ĉefe produktantan aliajn kemiaĵojn. En la pasintaj pli ol dek jaroj, ili senĉese reformis la teknologian procedaron kaj ekipaĵojn, tiel ke la kvanto kaj kvalito de la produktaĵoj altiĝis de tago al tago. Nun

la fabriko jam povas produkti 16 kemiaĵojn per sinteza utiligo de la materialo. La baria klorido produktita de ĝi estas eksportita al pli ol 30 landoj kaj regionoj.

Prenante sallikvon kaj salon kiel materialon, laboristoj de la Kemia Fabriko de Hongheĝen produktis unu post alia 5 gravajn kemiaĵojn. Laboristoj de Donghin-fabriko ekstraktis grandan kvanton da kuprika sulfato el kloaka kotaĵo kaj ankaŭ ekstraktis iun valoregan elementon el senutila gaso. En la jaro 1971, la tuta urbo kreis 39 novajn produktaĵojn per sinteza utiligo de materialo. Oni akiris certan sukceson ankaŭ en sinteza utiligo de tergaso. Iu gvidanta kamarado de la urbo diris al mi: "Post kelkaj jaroj, ĉi tie fariĝos nova urbo de kemia industrio."

*Salo senĉese transportata al aliaj lokoj*





# Majstro kaj Metilernanto

**G**AJE alrapidis Hong Ĝenju, majstro de la elektroforma laborejo, aŭdinte ke sur la murgazeto apud la larĝa vojo en la fabriko aperis artikolo de lia metilernanto Giang Taŭ. La fra-panta titolo de la artikolo saltas en liajn okulojn. Ĝi estas plano pri studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ. Post tralego de ĝi ĝojo reveliĝas sur lia vizaĝo.

Antaŭ kelkaj tagoj, nombro da metilernantoj de la fabriko estis baldaŭ finonta sian lernoperiodon. Giang Taŭ estis unu el ili. Li venis de sia lernejo al la fabriko antaŭ preskaŭ 3 jaroj. Kaj nun, pro la baldaŭa finiĝo de metilernado, svarmis en li jenaj pensoj: “Multiĝos mia salajro ... Kiam mi ricevos ĝin, mi antaŭpagos manĝokoston por la venonta monato kaj sendos kelkajn juanojn al la gepatroj .... kaj ankaŭ iros al Nankin-strato por aĉeti ĉemizon el kotona-poliestera ŝtofo... aŭ iros al Huajhaj-strato por aĉeti paron da elegantaj led-ŝuoj...”

Ĝuste tiam eksonoris signalo por elverŝado de ŝtallikvo kaj tio vekis lin el la medito. Li haste kuris al plata veturilo kaj ektuŝis ŝaltilon. Portante la ŝtallikvujojn, kies interno malhele ruĝis pro bakado de arda ŝtallikvo, la plata veturilo malrapide iris laŭ la trako al la ĉefa laborejo. La mura argano facile levis la ŝtallikvujojn kaj malrapide transmetis ĝin al la elverŝejo de ŝtallikvo...

“Haltu!” aŭdiĝis krio de majstro Hong kun ŝtaltubo en la mano, “haltu, argano!”

Malgranda Giang tuj elprenis sian fajfilon kaj haltigis la arganon per longa fajfo. La ŝtallikvujo restis apud la elverŝejo de ŝtallikvo.

Per unu salto majstro Hong proksimiĝis al la ŝtallikvujo, fiksas la ŝtaltubon al la sekuriga stango kaj forte turnadis ĝin ĝis kiam ĝi fariĝis ne plu movebla. Nur tiam Giang rimarkis, ke li forgesis turni la sekurigan stangon. La ŝtallikvo certe estus jam perdita, se majstro Hong ne rimarkus tion ĝustatempe!

Majstro Hong havas ĉirkaŭ 40 jarojn kaj oni povas konstati, laŭ lia fizionomio kaj parolmaniero, ke li estas homo travivinta multajn malfacilojn. De sia infanaĝo, li paŝtis bovojn por bienulo kaj laboris kiel lia jardungito. Estante 15-jara, li fuĝis al Ŝanhajo pro malsato kaj suferis tiranadon kaj ekspluaton de kapitalisto. En la jaro kiam Ŝanhajo liberiĝis, li aliĝis al Kompartio. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, li estis elektita kiel membro de la revolucia komitato de sia fabriko, sed li ĉiam persistas en fizika laboro ĉe la arde flamanta afinacia fornego.

Kaj lia metilernanto Giang, ĵus enveninte la fabrikon, sentis ĉion en ĝi tre interesa. Li ofte fiksrigardadis tra la bluaj okulvitroj la brilegan kolonon de ŝtallikvo verŝatan en ujejon kaj ordonis al si en la koro: “Ellernu rapide!” Li tutkore sin okupis per studo de tekniko kaj pli kaj pli malmulte zorgis pri aliaj aferoj. La majstro trovis tion ne korekta kaj en sia ripoztago biciklis al la hejmo de malgranda Giang en urba kvartalo kaj kore interbabilis kun li dum la tuta posttagmezo. Ĉe adiaŭo li ankoraŭ admonis la junulon: “Ne forgesu lerni kapablon de klasbatalo, krom tiun de produkta batalo.” Ĉiuj liaj vortoj tuŝis la koron de la junulo.



Nun, finverŝinte la ŝtallikvon, la majstro alprok-simiĝis al malgranda Giang kaj karesis lian ŝultron per sia fortika mano dirante: “Vi pensadas pri la finiĝo de via metilernado, ĉu ne?” La junulo klinis sian kapon kaj silentis.

Post la deĵoro, la majstro kaj la metilernanto iris ŝultro ĉe ŝultro, trapasis laboristan loĝkvartalon kaj suriris iun ponton malrapide, kaj iliajn okulojn kaptis la plaŭdanta fluo de Huangpu-rivero kiu rapidis antaŭen.

Sin apogante sur balustrado majstro Hong diris al la junulo emocie: “Malgranda Giang, antaŭ la finiĝo de via lernado vi devas pensi pli multe pri la peza ŝarĝo kiun vi devos porti sur via ŝultro!”

Senkomprene la metilernanto rigardis al la rivero kaj poste turnis sian kapon al la majstro. Li ne sciis kial la majstro elmetis al li tiun demandon.

Ŝajne majstro Hong ne atendis tujan respondon de malgranda Giang; efektive li tre bone sciis lian penson en la lasta tempo.

“Ho, kiel rapide pasis la tempo, malgranda Giang! Jam 22 jaroj!” daŭrigis la majstro. “Antaŭ 22 jaroj, kiam mi estis baldaŭ finonta mian lernoservon en fabriko...”

Tiam Ŝanhajo estis tuj liberigota. La tondrado de kanonoj de ĈPLA forte skuis la reakcian regadon de Kuomintango. Sub la gvido de la Partio, la laboristoj en la ŝtalfabriko, en kiu Hong laboris, faris batalon por protekti la fabrikon kaj la elektraĵojn kaj akvokondukajn ekipaĵojn por bonvenigi la ĈPLA-anojn, samkiel ŝanhajaj popolamasoj.

Subtera kompartiano onklo Jang tiam estis la majstro de Hong. Li organizis laboristojn por protekti la fabrikon kaj ekipaĵojn kaj samtempe preparis monon por propagandi kaj pretigi sloganojn por bonvenigi ĈPLA-on.

Onklo Jang ne esperis ke ankaŭ Hong kontribuos monon konsiderante ke li estas malriĉa kaj devas pagi urĝajn bezonojn por sia malsana patrino en vilaĝo. Sed Hong sin turnis al onklo Jang kaj ĝuste sur tiu ponto en vespero li ŝovis al sia majstro sian salajron unuafoje ricevitan post la finiĝo de sia lernoservo kaj zorgeme envolvitan en ruĝa papero. Onklo Jang ne volis akcepti ĝin kaj Hong malpacienciĝis. Tenante la manon de Jang li diris: “Ne rifuzu, onklo! Ĉar tio signifas mian amon al ĈPLA! Se mi vidus nur la etan individuan profiton, mi ne indus la nomon de laboristo!” Fine Jang akceptis la monon kaj Hong sentis varmon en la tuta korpo. Rigardante al la ondanta rivero, ili kva-zaŭ ekaŭdus kanontondron de ĈPLA...

Vesperruĝo plibeligis la trembrilantan riveron. Pensoj impetis en malgranda Giang kiel torento. Li estis multe ekscitita pro la rakonto de sia majstro. Firme tenante en sia mano la baskon li ĵetis rigardon al majstro Hong. Denove sonis en lia cerbo la voĉo de lia majstro: “Se mi vidus nur la etan individuan profiton, mi ne indus la nomon de laboristo!...” Jen bona modelo por laboristoj staras antaŭ li, spegulante liajn mankojn en ideologio.

Levante sian kapon li diris al Hong: “Majstro, nun mi komprenas...”

“Ne, vi ankoraŭ ne tute komprenas!” Rekomencis la majstro, forkaŝinte la apenaŭ rimarkeblan signon de rideto ĉe la buŝanguloj: “En klasa socio, ĉiuj klasoj konkuras por gajni al si la junulojn. Por restaŭri kapitalismon, klasaj malamikoj atakas la junulojn tra multaj kanaloj kaj per diversaj manovroj. Ili celas putrigi viajn pensojn. Ja estas bagateloj ke vi volas aĉeti ledŝuojn aŭ havigi al vi novajn vestojn. Sed, kiel oni traktas ilin estas tamen grava afero koncernanta ideologian batalon inter du klasoj!”

La junulo kapjesis.

Adiaŭinte sian majstron kaj reveninte hejmen, li sentis ke ĉiuj vortoj de la majstro trafis lian koron. Malferminte verkon de Prezidanto Maŭ, li refoje studis jenajn liniojn: “**Krom lerni specialigitajn studobjektojn, ili devas lerni marksismon, lerni kurantajn aferojn kaj politikon, por progresi ideologie kaj ankaŭ politike. Ne havi ĝustan politikan vidpunkton egalas ne havi animon.**”

La instruo de Prezidanto Maŭ lumigis lian koron. Li verkis sian studoplanon kun la titolo *Finiĝo de Metilernado Signifas Novan Starton de Daŭra Revolucio*.

Nun, kiam la majstro legas tiun artikolon en la murgazeto, rideto aperis sur lia vizaĝo. Tamen li pensis: “Simile al peco da fero ĵus ĵetita en fornogon, malgranda Giang ja bezonas zorgan afinaciadon por fariĝi bona ŝtalo malmola kaj elasta.”



# La Administraj Distriktoj kaj Konciza Geografio de Ĉinio

**L**A Ĉina Popola Respubliko situas en la orienta parto de Azio, ĉe la okcidenta bordo de Pacifiko. Ĝia tuta teritorio ampleksas ĉ. 9,600,000 kvadratajn kilometrojn kaj okupas la trian lokon de la mondo (post Sovetunio kaj Kanado).

Ĉinio havas vastan teron kaj longan marbordan linion. La distanco de ĝia orienta ekstremo ĝis ĝia okcidenta ekstremo estas pli ol 5,000 kilometroj kaj tiu de ĝia suda ekstremo ĝis ĝia norda ekstremo estas pli ol 5,500 kilometroj. Zengmu-rifo, la suda ekstremo de Ĉinio estas proksime de la ekvatoro.

Administre Ĉinio dividiĝas en 22 provincojn (inkluzive la liberigotan Tajvan), 5 aŭtonomajn regionojn kaj 3 urbegojn, nome Pekinon, Ŝanhajon kaj Tiangin-on rekte sub la centra registaro. En la tuta lando troviĝas sume pli ol 2,000 gubernioj.

Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio kuŝas en la ebenaĵo de norda Ĉinio. Ĝi estas konstruita en la jaro 937 p. K. kaj kiel ĉefurbo jam havas historion de pli ol 800 jaroj. Ĝi estas centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de Ĉinio. Sin trovas en ĝi multe da antikvaj konstruaĵoj. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en la 1-a de oktobro, 1949, socialisma transformado estis farita al la antikva urbo en politiko, ekonomio, kulturo kaj socia vivo, tiel ke la postĝinta kaj konsumanta urbo fariĝis industria urbo kun grandaj fabrikoj de fero kaj ŝtalo, maŝinfarado, petrolo, kemia industrio k. a. Multaj modernaj konstruaĵoj estas starigitaj. La nuna konstrua areo de Pekino estas 3.5-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo.

La tera landlimo de Ĉinio longas 22,800 kilometrojn. Oriente de ĝi estas Koreio, nordoriente, nordokcidente kaj parte en la okcidento kuŝas Sovetunio; norde de ĝi kuŝas Mongolio; parte en la okcidento kaj sudokcidente de ĝi kuŝas Afganio, Pakistano, Hindio, Nepalo, Sikimo kaj Bhutano; sude kuŝas Birmo, Laoso kaj Vjetnamio; kaj oriente kaj sudoriente trans la maro kuŝas Japanio, la Filipinoj kaj Indonezio.

La longeco de la marbordlinio de la ĉina kontinento estas 14,000 kilometroj. En la maroj de Ĉinio dissemiĝas pli ol 5,000 insuloj grandaj kaj malgrandaj, el kiuj la plej granda estas Tajvan (inkluzive Diaŭju-insulo kaj aliaj) kaj la dua estas Hajnan. La du insuloj havas riĉajn fontojn de mineraloj kaj oni nomas ilin trezoraj insuloj de Ĉinio.

Pro la dekliveco de la tero de Ĉinio, la plejparto de ĝiaj riveroj fluas de okcidento orienten en la Pacifikon. La grandaj riveroj de Ĉinio estas Jangzi, la Flava Rivero, Perlo, Hejlong, Songhua kaj Huajhe.

Jangzi-rivero longas 5,800 kilometrojn, estas la plej longa rivero en Ĉinio kaj la kvara en la mondo. La ebenaĵo de la meza kaj malsupra baseno de Jangzi-rivero havas en si densajn riveretojn kaj multajn lagojn kun varmeta kaj humida klimato, kaj fekundan teron. Ĝi estas ĉefa produkta regiono de rizo en Ĉinio, kaj krome ĝi produktas ankaŭ tritikon, kotonon, kolzon kaj kokonojn.


La Flava Rivero estas la plej sabloza rivero en la mondo. En iuj lokoj de ĝia malsupra baseno, ĝia riverlito kuŝas je 4-10 metroj super la ternivelo. Estas skribite en la historio, ke en 2,000 jaroj antaŭ la Liberiĝo okazis pli ol 1,500 digobreĉiĝoj de la Flava Rivero. Post la Liberiĝo, la ŝtato faris grandskalan laboron en ordigo de la Flava Rivero. De la jaro 1949, neniam breĉiĝis ĝia digo, kvankam ĝi estis 9-foje minacata de inundo.

La plejparto de la teritorio de Ĉinio kuŝas en la norda mezvarma zono, kie la kvar sezonoj estas klare distingeblaj. Varmego akompanata de pluvozo formas bonan naturan kondiĉon por disvolvi agrikulturan produkton.

En vintro, tre granda estas la temperaturo diferenco inter suda kaj norda Ĉinio, sed en somero male. Inter Harbin de nordorienta Ĉinio kaj Kantono de suda Ĉinio, la meznombra temperaturo diferenco en januaro estas 35°C. Kiam la baseno de Songhua-rivero estas ankoraŭ kovrata de glacio kaj neĝo, printempo jam beligas la bordojn de Perlo-



## Administraj Distriktoj kaj Dislokigo de Nacimalplimulto de Ĉinio



1. Hejlongjiang, 2. Gilin, 3. Liaŭning, 4. Hebej, 5. Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, 6. Ŝanhi, 7. Ŝandong, 8. Giangsu, 9. Henan, 10. Anhuj, 11. Ĝegiang, 12. Gianghi, 13. Fugian, 14. Tajvan, 15. Guangdong, 16. Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono, 17. Junnan, 18. Gujĝoŭ, 19. Hunan, 20. Hubej, 21. Siĉuan, 22. Ŝenhi, 23. Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, 24. Gansu, 25. Kinghaj, 26. Tibeta Aŭtonoma Regiono, 27. Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono

rivero. Sed en julio, la temperatura diferenco inter la du regionoj estas nur 5°C kaj ambaŭ estas en sezono de naĝado. Pro pluvozeco en la sudo de Ĉinio pluvsirmilo estas necesa tie por ĉiu, sed en multaj lokoj de la seka Nordokcidento tio estas senutila.

La teritorio de Ĉinio estas vasta, ĝi etendiĝas sur 49 gradoj en latitudo kaj pli ol 61 gradoj en longitudo. Ĉinio havas multajn naturajn riĉfontojn. Nun ĝi havas pli ol 1,600,000,000 muojn (muo=1/15 hektaro) da agro. Ĝiaj plantaĵoj varias laŭ la malsamaj klimatoj de diversaj lokoj. En suda Ĉinio rizo estas multe kulturata, en norda kaj nordokcidenta Ĉinio bone kreskas tritiko, hordeo, milio kaj maizo; en la Nordoriento kreskas sorgo kaj tritiko. Kotonon estas la ĉefa ekonomia plantaĵo de nia lando, ĉina teo estas fame konata en la mon-

do kaj ĝia produktokvanto de sojo okupas la unuan lokon en la mondo.

La Ĉina Popola Respubliko estas unueca lando kun multaj naciecoj. Ĝi havas pli ol 700 milionojn da diversnaciecaj loĝantoj diligentaj kaj bravaj. La hanoj konsistigas 94% de la tuta loĝantaro, la ceteraj pli ol 50 frataj naciecoj estas la mongoloj, hujoj, tibetanoj, ujguroj, mjaŭoj, jioj, ĝŭangoj, bujioj, koreoj, dungoj, jaŭoj, bajoj, kazaĥoj, tajoj, lioj, gaŭŝanoj k. a. La nacimalplimulto loĝas en tre vasta areo, plejparte en la nordokcidenta kaj sudokcidenta regionoj. Sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la diversaj naciecoj de Ĉinio, harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio, unuiĝas pli bone por konstrui la grandan socialisman patrolandon.

# Orelfungo de Dongning

**O**RELFUNGO (aŭrikulario) estas speco de manĝebla fungo. Ĝi havas aparte plaĉan guston kaj estas nemalhavebla sanprotekta nutraĵo por ŝpinteksistoj. Ĝi estas riĉa je proteino kaj mineralo kaj bone efikas kiel fortigilo kaj kvietigilo en medicino.

Multaj lokoj de nia lando havas longan historion de abunda produkto de orelfungoj ekzemple, la regionoj de Baŝan-montaro de norda Siĉuan kaj Kinling-montaro de suda Ŝenhi, Henan, Hubej, Guangdong, Guangxi k. a. Ankaŭ en relative malvarmaj regionoj de norda Ĉinio troviĝas produktaĵoj de orelfungoj. Dongning-gubernio de Hejlonggiang-provinco estas unu el ili.

Dongning estas ĉe norda latitudo 44° en la sudorienta angulo de Hejlonggiang-provinco. Tie estas multaj montoj sur kiuj ĉie kreskas diversspecaj kverkoj, kio estas bona kondiĉo por produkti orelfungojn, ĉar nur sur tiaj lignopecoj povas elkreski bonkvalitaj orelfungoj. Dongning jam havas relative longan historion en produktado de orelfungoj. Precipe en la lastaj jaroj, pli ol cent brigadoj de la tuta gubernio ĉiuj havas siajn kulturejojn por orelfungoj, tiel ke ĝia produktokvanto pli-ol-20-oble plimultiĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Kvankam orelfungo estas speco de memkreska fungo, tamen kamparanoj devas diligente labori kaj longe flegi ĝin dum la kreskado. Ili unue devas elekti taŭgajn arbojn kaj lokojn kun konvenaj temperaturo kaj humideco. En frosta vintro ili devas iri en montaron por haki arbojn kaj segi ilin en lignopecojn, poste meti ilin sur taŭgajn lokojn por ke ili putriĝu. Kiam ekvarmiĝis en printempo, ili devas starigi sur la lokoj apogilojn kaj apogi lignopecojn al ili por kreskigi bonajn orelfungojn. Laŭ la malnova maniero, kulturado de orelfungoj bezonis tri jarojn: en la unua jaro haki arbojn, en la dua elkreskigi orelfungojn kaj en la tria rikolti ĝin. Post 2-3-jara rikoltado, la lignopecoj tute putriĝis kaj la rikoltado finiĝis.

Tiamaniere oni povis profiti nur post longa tempo. Komunumanoj de Mejkuang-brigado de Dongning-gubernio decidis rompi la malnovan rutinon kaj krei avangardan sperton por akceli la produktadon de orelfungoj. Helpate de koncernaj

unuoj, ili fondis sciencajn eksperimentan grupon. Ili ofte iris al la kulturejo en montaro malgraŭ vento kaj pluvo por observi la kreskan staton kaj ŝanĝiĝon de orelfungoj kaj iam eĉ tagnokte restis tie por akiri kompletan materialon por studo. Sur tiu bazo, aplikante avangardan sperton de aliaj lokoj, ili fine kreis novan kulturan metodon de orelfungoj konforman al la lokaj kondiĉoj. Post kelkdek eksperimentoj en tri monatoj, pli ol 50-jara teknikisto Kou Juĉeng sukcesis elkulturi micelion de orelfungo per ordinaraĵoj. Du monatojn post kiam oni metis micelion sur arbotrunkon dehakitan en la sama jaro, sur ĝi povas elkreski orelfungoj. Kaj la rikolta tempo plilongigis 2-3 jarojn kompare kun la antaŭa. La produktokvanto pligrandiĝis je 600-1000% kompare kun la pasinta. La nove elkulturita orelfungo ne nur havas pli bonan guston, sed ankaŭ povas esti inokulita al lignoj de ulmo kaj betulo.

## Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon  
de

## Radio Pekino

### Por Eŭropo

GMT	Vendredo k Sabato 20:00—20:30
Ondoj(m)	47 45 31 25

### Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30
Ondoj(m)	47 40

### Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00
Ondoj(m)	25 19






### FOSILIAJ DENTOJ DE SIMI-HOMO UNUAFOJE TROVITAJ EN JUNNAN-PROVINCO

Ĉinaj geologiaj laborantoj unuafoje malkovris en Junnan-provinco de sudokcidenta Ĉinio du fosiliajn dentojn de simi-homo. Tio estas alia grava malkovro post la fosilioj de pekina simi-homo kaj lantian-a simi-homo. Ili havas grandan sciencan valoron por plua studo pri la antikva homaro kaj la geologiaj kondiĉoj de la kvaternaro en sudokcidenta Ĉinio.

La du fosiliaj dentoj estis trovitaj en la ruĝtera stratumo en Ŝangnabang-distrikto de Juanmoŭ-gubernio je la 1-a de majo, 1965. Tiuj du supraj mezaj incizivoj estas grize blankaj kaj profunde fosiliĝintaj.

Ĉinio estas unu el la landoj, kie abundaj restaĵoj de fosilioj de antikvaj homoj estas malkovritaj. La multaj simi-homaj fosilioj trovitaj antaŭ kaj post la Liberiĝo ĉe Ĝoukoŭdian proksime de Pekino kaj la simi-homaj fosilioj trovitaj ĉe Lantian en Ŝenhi-provinco antaŭ kelkaj jaroj pruvas, ke la norda parto de Ĉinio estis grava regiono en la evoluo de la homaro dum la simi-homa stadio. La simi-homaj fosiliaj dentoj ĉifoje malkovritaj en suda Ĉinio donis gravan spuron por plua



*Fosiliaj supraj  
mezaj incizivoj*

serĉado de simi-homaj fosilioj en suda Ĉinio.

### DU NOVAJ KOLORAJ FILMOJ

La kolora filmo *Blankhara Knabino* estas kune farita de la Ŝanhaja Filmfarejo kaj la Ŝanhaja Dancolernejo. La alia kolora filmo kune farita de la Centra Filmfarejo de Novajaj kaj Dokumentaj Filmoj, la Centra Muzika Ensemblo kaj la Ĉina Pekinopera Trupo enhavas *fortepianan muzikon "Ruĝa Signal-lanterno" kun Kantado de Pekina Opero*, fortepianan koncerton *La Flava Rivero* kaj la simfonion *Ŝagiabang*. Tiuj du filmoj estis ekludataj en Pekino kaj aliaj urboj kaj vilaĝoj je la 15-a de februaro.

**E**N majo de la kuranta jaro estis la 30-a datreveno de la publikigo de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ Zedong.

Por ĝin memori, ni publikigis, en tiu ĉi numero, artikolojn verkitajn de novaj kaj malnovaj literaturaj kaj artaj laborantoj Gu Juan, Gin Ziguang, Jin Ĉengĝong kaj Liu Ĉangju por nia gazeto.

La artikolo de kamarado Gu Juan faris retrorigardon al la tiamaj literaturaj kaj artaj rondoj de Jan-an kaj prezentis al la legantoj la literaturan kaj artan kunsidon sub persona prezidado de Prezidanto Maŭ kaj la profundan signifon de la publikigo de la gravaj paroladoj. Kamarado Gin Ziguang ludis siatempe la rolon de Lin Ĉong, kiu forte oponis kontraŭ feŭdisma subpremo en la pekina opero

*Premite al Liangŝan-monto por Ribeli*, kiun Prezidanto Maŭ laŭdis. En sia artikolo, li ĉefe parolas pri la reverkado de la opero, kiu reinversigis la historion inversigitan de la reganta feŭda klaso. La aliaj artikoloj enlige kun la konkreta praktiko de la verkintoj respegulas de malsamaj anguloj, kiel la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj profunde penetris en la ardan batalvivon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, pene reformis sian neproletaran mondkoncepton, klopodis prezenti laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn por servi al ili, por socialismo kaj por la proletara politiko en la socialisma periodo, laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ en la paroladoj. En la praktikado, ili kritike heredis kaj adoptis tradiciajn kaj fremdlandajn teknikojn kaj formojn, utiligis la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligis la fremdlandajn en servo al Ĉinio kaj elvolvis

novon el la malnovo kaj donis al revoluciaj enhavoj kiel eble plej perfektajn formojn, tiel ke la verkoj de ili kreitaj plaĉis al la vastaj revoluciaj amasoj.

Kaj tiaj artaj ensembloj kia estas priskribita en la artikolo *Kanti por la Paŝtistoj* sin trovas en diversaj lokoj de nia lando. Multaj el la verkistoj kaj aktoroj devenis de la amasoj, vivas kune kun ili kaj prenas sian subjektomaterialon el la aktuala batala vivo. Iliaj programeroj estas ne nur aktualaj sed ankaŭ facile kompreneblaj, tre instruaj kaj stimulaĵoj por kaj varme akceptataj de la amasoj.

Nemalmultaj legantoj esprimis sian esperon informiĝi pri geografio de Ĉinio. En tiu ĉi numero ni aperigis la artikolon *La Administraj Distriktoj kaj Konciza Geografio de Ĉinio* kiu liveras al vi fundamentajn sciojn en tiu sfero.

## Esperanta informo

### 57-a Universala Kongreso de Esperanto

De la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1972 okazos la 57-a Universala Kongreso de Esperanto en Portland, Oregon, Usono.


Dum la kongreso okazos ankaŭ tri-taga konferenco de TEJO.

Postkongreso estos okazigita en San-Francisko de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto.


Ĝis la 22-a de februaro 1972 aliĝis 572 kongresanoj el 37 landoj.




# Eburaj Skulptaĵoj




Ĉangking Montras al Vu Kinghua la Vojon (el *Ruĝa Virina Taĉmento*).



Sur la revena vojo








La Nankina Pontego  
super Jangzi-rivero

Li-nacieca milicanino  
de Hajnan-insulo







# Amikeco Transdonita per

## Leterkolombo

**L**UN tagon de novembro de 1971, sur Haka-tako-aerodromo de Fukuoka de Japanio, iu juna japana virino kun kolomba kaĝo en la mano petis japanan amikon, kiu tuj vizitos Ĉinion, ke li portu la ĉinan kolombon al Pekino kaj ĝin redonu al ĉina amiko. La virino nomiĝas Kojima Jukiko. Ŝia edzo Kojima Hiroŝi estas kuiristo de la fiŝkapta ŝipo Daijuni Kaikomaru de Murajama-Akvoprodukta Kompanio de Fukuoka-gubernio. Estis li, kiu kaptis la kolombon.

Nagai Sunao, membro de la Delegacio de Aktivuloj de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio (Ortodoksa) al Ĉinio, ĝoje akceptis ŝian komision. Kiel do la leterkolombo venis al Japanio? Kaj kiel ĝi revenis al Ĉinio? Pri tio estas jena rakonto.

Je la kvina posttagmeze de la 15-a de oktobro, 1971, kiam la ŝipo fiŝkaptadis sur la Orienta Maro, subite kolombo tre lacigita falis sur ĝian ferdekon. Kojima Hiroŝi kaptis ĝin kaj trovis sur ĝi aluminian piedringon kun la vortoj "564, Hongki de Hefej",

per kiuj li rekonis ke ĝi estas ĉina leterkolombo. Antaŭe, kiam sovaĝaj kolomboj, ortiksoj kaj aliaj birdoj estis kaptitaj sur la ŝipo, la kuiristoj ofte preparis el ili bonan manĝaĵon. Ĉifoje, kun amo al Ĉinio, Kojima Hiroŝi ne mortigis la kolombon kaj ĝin zorgeme nutris eĉ en tempo kiam li estis tre okupata pri laboroj sur la ŝipo.

Post plenumo de sia fiŝkaptado, la ŝipo veturis returnen. Ankaŭ la leterkolombo veturis per la 88-tonela ŝipo al Hakatako-haveno.

Post alboriĝo de la ŝipo, Kojima Hiroŝi zorge kunportis hejmen la leterkolombon kaj donis ĝin al sia edzino Kojima Jukiko. Ankaŭ la lasta nutradis ĝin ĉiutage kun la profunda amikeco inter Japanio kaj Ĉinio. Poste ŝi pensis: "De la kolombo mi ricevas ĝojon, sed la ĉina amiko perdinta la kolombon certe estas turmentata de maltrankvilo!" Sekve ŝi decidis redoni ĝin al Ĉinio pere de la ĉefa oficejo de Fukuoka de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio (Ortodoksa).

*Delegaciestro Uŝikubo Sokiĉi rakontas al konduktoj pri la leterkolombo de amikeco.*





Kojima Jukiko skribis al la ĉina amiko leteron plenan de varmaj sentoj. Ŝi skribis interalie: “La kolombo loĝis ĉe mi dum unu monato. Ĉiufoje kiam mi nutris ĝin, la nutraĵoj estis tre rapide forkonsumitaj, kaj dum trinkado ĝi kveris de tempo al tempo kvazaŭ diranta ion ... Mi deziras ke la kolombo sekure revenu al sia mastro, kaj ke la amikeco inter la popoloj de Japanio kaj Ĉinio ĉiam pli fortiĝu kiel la kolombo kaj libere flugu.”

Nurajama Mistuo, direktoro de la Murajama Akvoproduktaĵa Kompanio de Fukuoka skribis al la Ĉina-Japana Amikeca Asocio varman leteron, en kiu li diris krom rakonto pri la entuziasmo de Kojima Jukiko en nutrado de la kolombo: “La tuta laborantaro de la kompanio ĉiam postulas restarigon de diplomaciaj rilatoj inter Japanio kaj Ĉinio kaj forte deziras aliĝi al la Japana-Ĉina Amikeca Asocio. Estas bone se per tio ni povas iom kon-

tribui al la movado de amikeco inter Japanio kaj Ĉinio.”

Kaj Nagai Sunao preparis sufiĉajn nutraĵojn por la kolombo, kaj veturis kune kun ĝi de Tokio al Kantono tra Hongkongo.

Kiam la vagonaro, per kiu veturis la delegacio, forlasis la stacion de Kantono, konduktoro disaŭdigis al la pasaĝeroj: “La japana delegacio vizitanta nian landon alportis al ni ĉinan leterkolombon... la kolombo de amikeco estas en nia vagonaro.” Tio tre interesis la pasaĝerojn. En la 25-a de novembro, kiam la delegacio atingis Pekinon, Uŝikubo Sokiĉi, la estro de la delegacio, transdonis la leterkolombon al koncerna unuo de Ĉinio. Kvankam la kolombo ne kunportis leteron, tamen ĝi ja alportis tre profundan amikecon de la japana popolo al la ĉina.

# Japania Dramtrupo “Dentrado” en Pekino

SONG JI

**L**A japana dramtrupo “Dentrado” ne estas fremda al la pekinaj spektantoj. En la 26-a de decembro de 1971, sub la gvido de sia estrino Fuĝikaŭa Nacko ĝi refoje vizitis nian landon kaj faris prezentadon. La spirito de la heroa batalado de la japanaj revoluciaj popolanoj kaj ilia profunda amikeco al la ĉina popolo forte kortuŝis kaj stimulis la pekinajn rigardantojn. En Pekino la dramtrupo prezentis la pluraktan dramon *Ondego* kaj unuaktajn dramojn *Urbo en la Malsupra Baseno de Rivero*, *Indigna Flamo de Okinavo* kaj *Certe Venkos la Japana Revolucio*, kiuj estis bone akceptataj de la spektantoj.

Per la scenoj de grandioza batalo de la japanaj laboristoj kontraŭ revivigo de la japana militarismo, la dramo *Ondego* kreis grupon da heroaj figuroj kun Tanimoto Kacuari, avangardo de la japana laboristaro, kiel la centro kaj prikantis la grandan forton de la unuiĝinta japana laboristaro — la ĉefa trupo de la japana revolucio en batalo.

Tanimoto Kacuari estas elstara reprezentanto de la japana laboristaro. Li havas kaj grandan revolucion idealon kaj peneman laborstilon, kaj heroan batalspiriton kaj altan batalarton. Li estas kaj ordinara laboristo kaj bonega gvidanto, kiu kondukas amasojn por batalo.

Sub la kamufflo de disvolvo de la kompanio, la malamiko fabrikis planon de tiel nomata nova raciigo. Tanimoto Kacuari trafe montris, ke tio estas “nigra modelo de militarisma regado starigita de la kompanio sur ferdeko de milita ŝipo”. En la kompleksa batalo, li malkovris diversajn intrigojn de la malamiko kaj ĉiam tenis la direkton de la batalo kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj. Por estingi la fajregon de la strika batalo, la malamiko uzis senhontajn rimedojn kiel minacon, logadon kaj enkarcerigon por fleksigi lin. Tamen antaŭ la fera homo de la laboristaro Tanimoto Kacuari, fiaskis ĉiuj manovroj de la malamiko. La sceno “Batalo en Malliberejo” koncentre prezentis lian neflekseblecon kaj sentiman batalspiriton.





*Unu el la scenoj de la dramo Ondego prezentata en Pekino*

En *Ondego*, oni ankoraŭ sukcese kreis figurojn de vigleplenaj laboristoj kiel Jamabe Tooru, Katajama Secko k. a. En la batala fajro, ili rapide kreskis en avangardajn batalantojn de la proletaro kaj batalas ŝultro ĉe ŝultro kun Tanimoto Kacuari, kiuj formis grupon da bravaj herooj.

La dramo de la komenco ĝis la fino estas saturita de la revolucia kaj batala spirito de la japana popolo kaj faris valoran klopodon ankaŭ en arta formo. Kiel pekina artisto Gjun King diris: La direktoro majstre aranĝis la disvolviĝon de la dramo, tiel ke ĝia procedo pli kaj pli forte kaptis la spektantojn. La dekoracio de la unua sceno estas malvarma ferdeko, sur kiu laboras veldistoj en frosta vintro kaj disŝpruciĝas blindigaj sparkoj. Tiu aranĝo ne nur montras la vintrosimilan politikan situacion de la japanaj laboristoj, sed ankaŭ montras, ke certe ili ne volantas esti sklavoj kaj disfloros ilia revolucia batalo kiel sparkoj en nokto.

La artaj laborantoj de "Dentrado", kiuj partoprenis en la revolucia batalo de la japana popolo,


entuziasme prezentas ĝin. Aktoroj Aja Kjooko kaj Jasumoto Kijofumi diris: "Kiam la heroaj kamparanoj de Sanrizuka ekbatalis kontraŭ la uson-japana reakciularo, kiu okupis kampojn por konstrui militan aerodromon, parto de la laborantoj de la trupo tuj iris tien por batali kune kun ili. En la batalo ili kreis unuaktan dramon *Urbo en la Malsupra Baseno de Rivero* kaj baldaŭ prezentis ĝin sur simpla scenejo de Sanrizuka. Aktoroj portantaj sur sin simplajn vestojn de japanaj kamparanoj laŭte kantis: "Indigna fajro subpremata en la koro fandas neĝon amasigitan sur montsupro. Levu la batalan flagon! Brulas la koro sopiranta al reformo de la mondo..." La kanto emociis kaj kuraĝigis ĉiujn spektantojn.

Dum prezentado de la dramoj, la membroj de "Dentrado" starigis profundan amikecon kun la ĉinaj artaj laborantoj en ilia kunlaboro. Por ke la ĉinaj spektantoj bone koni la enhavon de la dramoj, 6 aktoroj de la Ĉangĉun-a Filmfarejo estis komisiitaj por sinkrone interpreti la dramojn. Ja estas vere



*Aktorino de la trupo interbabilas kun pekina artistino.*

*Dum sia vizito al la Pekina Ĝenerala Petrolkemia Fabriko, geaktoroj de la japana dramtrupo "Dentrado" faras prezentadon por ĝiaj laboristoj.*




malfacile por la 6 ĉinaj aktoroj sinkrone interpreti por 20-30 roloj en la dramoj kaj ĝuste esprimi iliajn sentimentojn. Tamen ili ne timis malfacilojn kaj ĉiamaniere klopodis por bone plenumi la taskon. Kamarado Liang Jin, unu el la son-sinkronigaj aktoroj, diris: "Antaŭe mi neniam faris tian laboron. Kiam la gvidantoj donis al mi tiun taskon, mi kaj ĝojis kaj maltrankviliĝis. Tamen, kiam mi pensis, ke nia laboro servas por plifortigi la amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj kaj respieguli la rikolton de la diligenta laboro de la dramtrupo 'Dentrado', ni levis nian memfidon. La estrino kaj aktoroj de la trupo pacience konigis al ni la scenarojn kaj ankaŭ rakontis al ni la batalon de la japana popolo kontraŭ la uson-japana reakciularo, kio donis al ni konkretan helpon kaj profundan edukon."

Dum sia ludado en Pekino la trupo vizitis fabrikojn, vilaĝojn, trupojn de ĈPLA kaj pitoreskajn kaj historiajn vidindaĵojn. Ili vizitis ankaŭ la Ĉinan Baledan Trupon, Pekinoperan Trupon de Pekino kaj spektis revoluciajn modernajn pekinoperojn prezentatajn sur pekina scenejo. Krome, ili interŝanĝis artan sperton kun la ĉinaj kolegoj. Ĉio ĉi tio pliapaŝe plifirmigis la amikecon kaj unuiĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio.



# La Malpurigo de Ĉirkaŭaĵo Portis Plagon al la Japana Popolo



*La aero venenita de kemia  
nebulo en Tokio-regiono*

**R**EZULTE de akcelado de militarismo kaj ĉasado de alta profito fare de la japanaj monopolaj kapitalistoj kaj reakcia registaro, Japanio nun fariĝis unu el la landoj kun plej serioza malpurigo de ĉirkaŭaĵo.

En la urbegoj kaj industriaj areoj kie densas fabrikoj, nebuliĝas la fumo kaj malpuriĝas la aero. Ĉiam pli multiĝas eluzita gaso, cindro, polvo, pulvoro, malpura akvo kaj aliaj forĵetaĵoj. Laŭ nekompleta statistiko, ĉiujare 12,000,000 tunoj da sulfura oksido kaj aliaj gasoj post brulo de petrolo kaj pli ol 10,000,000 tunoj da karbona mono-oksido ellasitaj de aŭtoj eniras en la aeron. La kvanto de hidrogena klorido naskita pro bruligo de forĵetitaj plastaĵoj ĉiujare atingas centmilojn da

tunoj. Krome, fumo, gaso kaj alia materio estas grandkvante ellasitaj de fera-ŝtala, petrola kaj kemia industrioj kaj termoelektoj. Super ĉiu kvadrata kilometro en la aero estas 32 tunoj da venena gaso. Tio ĉi estas la plej alta cifero en la mondo superante tiun de Usono.

En Tokio, ĉiujare troviĝas nur dekkelkaj tagoj en kiuj oni povas klare vidi la monton Fuji. Ĉe la industria areoj de cemento, fero, ŝtalo k.a. ĉiutage falas de la ĉielo granda kvanto da pulvoro. Laŭ enketo de la japana registaro, en junio de 1970 preskaŭ 39 tunoj da pulvoro falis sur ĉiu kvadrata kilometro en la urbo Vakajama. En la dense loĝata kvartalo de la urbo Kawasaki eĉ falis deĉiele "metala pluvo" — en daŭro de pli ol 4 horoj metalaj pulvoroj brilantaj.



*Mevo estas agonianta pro la venenita riverakvo.*

*Labrako kaj ĉerizruĝa salikoko, specialaj akvo-produktaĵoj de Japanio, preskaŭ neniigis pro venenita akvo de la apudborda maro. La foto montras mortintajn fiŝojn.*



En Japanio, pli ol 13,000 milionoj da tunoj da industrie ellasita likvaĵo kun kemia tokso fluas ĉiujare en lagojn, riverojn kaj la maron. La fabrikoj de la urbo Fuji ĉiutage ellasis 2,000,000 tunojn da likvaĵo en la maron. Preskaŭ 200,000 hektaroj da kampoj nun estas venenitaj de tia likvaĵo, kaŭzante grandmezuran reduktion de grenprodukto kaj malbonigon de ĝia kvalito.

La riveroj trapasantaj la regionon de Tokio ĉiuj estas serioze malpurigitaj, sed la plejpartaj loĝantoj de tiu regiono trinkas akvon de tiuj riveroj. En januaro de 1970, subite ellasis fetoron de la akvokondukilo en la suda kaj orienta Tokio, kio portis ĝenon al ĉirkaŭ 1,260,000 familioj. En la pitoreska lago Bivako la akvo nun malpurigis kaj fetorigis. Ankaŭ la akvo kondukata el tiu lago provizata al la loĝantoj de la urbo Osaka ofte eligas naŭzan odoron.

La golfoj Tokio, Jise, Dokaj kaj la interna maro Seto ĉiuj estas serioze malpurigitaj de eluzita likvaĵo. Plejparto de la japanaj apudmaraj fiŝriĉfontoj estas difektitaj kaj la apudmara fiŝkaptakvanto reduktiĝas jaron post jaro. Kelkaj famaj akvoproduktaĵoj kiel labrako kaj ĉerizruĝa salikoko preskaŭ eliminiĝis.



Ĝis 1969, la japanaj monopolaj kapitalistoj starigis 170 fabrikojn de papero, medikamento, metalurgio k.a. ĉe urbo Fuji, kiu alfrontas Surugagolfon kun abundaj akvoproduktaĵoj. La paperfabrikoj ĉiutage ellasas 2,000,000 tunojn da malpura akvo en la havenon Tago-noŭra, tiel ke ĝia akvo fariĝis tre haladza kaj la organismoj en ĝi preskaŭ ĉiuj mortis. La akvo en la haveno profundis 9 metrojn antaŭe kaj 10,000-tonela varŝipo povis ankri en ĝi; sed nun, la haveno profundas nur je 4-5 metroj pro sedimentiĝo de forĵetita pulpo, kaj granda ŝipo ne plu povas eniri. La akvo en kaj ĉirkaŭ la haveno fariĝis ruĝbruna. La fiŝoj kaj marvegetaĵoj en la haveno kaj Surugagolfo malpliĝis jaron post jaro. La fiŝistoj vivas ĉiam pli malfacile pro la difektiĝo de fiŝejoj.

Pli ol 1,000 fabrikoj de japanaj monopolaj kapitalistoj ellasas ĉiutage 4,000,000 tunojn da forĵetitaj materio kaj likvaĵo en Dokaj-golfon norde de Kjuŝu, mortigis grandkvante fiŝojn kaj transformis la golfon en "mortan maron".

Sub tiaj cirkonstancoj, multaj japanaj loĝantoj suferis de diversaj malsanoj kaŭzitaj de la malpurigo de ĉirkaŭaĵo kiel astmo, ostodoloro kaj "minamata-o". La malsano "minamata-o" kiu originis de la urbo Minamata, kaŭzis paraliziĝon kaj aliformiĝon de la manoj kaj piedoj, kaj ĉiam pli multiĝas pacientoj de tiuj malsanoj. Laŭ statistiko multe reduktita de japana registaro, estas 2266 tiaj malsanuloj en Osaka kaj 1696 en Amagasaki. De 1967 ĝis februaro 1971, pli ol 120 homoj suferis de ostodoloro, el kiuj 28 jam mortis. Lastatempe, la ostodoloro aperis sinsekve en la urboj Kurobe, Annaka kaj la insulo Cuŝima. Ĝis februaro 1971, la "Minamata"-malsanuloj apud Ŝiranuj jam nombriĝis pli ol 20,000. Suferinte de tiaj malsanoj, multaj kamparanoj, fiŝistoj, laboristoj kaj aliaj urbanoj mortis tragike pro manko de kuraco kaj ankaŭ iuj sin mortigis, ne povante elteni la turmentadon de tiaj monstraj malsanoj.

La malfeliĉego altrudita al la laboranta popolo de Japanio vekis grandan indignon kaj fortan oponon de la popolanoj de diversaj rondoj kontraŭ la monopolaj kapitalistoj. Vigle leviĝis tra la tuta Japanio batalo por protekti naturan riĉfonton, akiri vivrajton kaj oponi kontraŭ monopola kapitalo. Multfoje okazis strikoj, mitingoj kaj manifestacioj por kondamni la japanan regantan klikon kaj monopolan kapitalon ke ilia faro sen konsidero pri la popola sano portis al la popolo la seriozan malpurigon de ĉirkaŭaĵo. Oni alte tenis la slo-



*Popolanoj de Jamaguĉi-gubernio manifestacias kontraŭ la reaktia Sato-registaro.*

gantabulojn en kiuj estas skribitaj "Redonu al ni nian serenajn ĉielojn!" "Redonu al ni niajn riverojn kaj marojn!" "Redonu al ni nian vivon!" "Kontraŭ revivigo de japana militarismo!" kaj "For la reaktian Sato-registaron!" Ankaŭ multaj malsanuloj venis al mitingo kaj akuzis la damndan kapitalisman socisistemon per sia sufero.

La krima malpurigo de ĉirkaŭaĵo certe incitos ĉiam pli fortan oponon de la vasta japana laboranta popolo. la dissemantoj de plago, japanaj monopolaj kapitalistoj kaj reaktia Sato-registaro, certe rikoltos sian amaran frukton!

## Ni Estas Samfamilianoj

**O**KAZE de la Printempa Festo de la kuranta jaro, Vang Honghin, soldato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, revenis al Pekino, kiun li forlasis antaŭ tri jaroj, por vidi siajn familianojn. Kiam li vidis la novan fizionomion de la konata ĉefurbo, li sentis ĝin senkompare intima.

Li iris en strateton. Kiam li proksimiĝis al sia hejmo, li vidis, ke malfacile iras antaŭ li mezaĝa virino kun sako da faruno surŝultre kaj du fiŝoj enmane. Li kuratingis ŝin kaj diris: “Kamaradino, mi helpu vin!”

“Dankon, mi mem portu. Jam ne fore.” Respondis la kamaradino.

“Ne rifuzu, kamaradino, estas malfacile por vi porti ilin . . .” Tion dirante, Honghin transprenis la sakon de la kamaradino.

La virino kun danko rigardis Honghin kaj trovis, ke li iom similas al onklino Vang, familiano de armeano. Ŝi demandis: “Kamarado, kien vi iras?”

“Hejmen, en n-ro 28 de ĉi tiu strateto.”

“Ĉu en la norda domo de onklino Vang?”

“Jes, ĝuste.”

“Oh, ni iras. . .” la kamaradino ĉesigis sian parolon kaj ekridis.

Kiam ili atingis n-ron 28, la kamaradino diris: “Jen via hejmo, bonvole eniru!”

“Ne! Unue al via hejmo.” Honghin respondis.

“Kamarado, ni iras al sama hejmo.” La kamaradino ridante diris kaj kuris en la korton laŭte kriante: “Onklino Vang, revenis frato Honghin!”

Onklino Vang tuj eliris kun granda ĝojo kaj varme kondukis ilin en la domon.

Kiam onklino Vang trovis, ke Honghin tion ne komprenis, ŝi diris al li: “Ŝi estas vendistino de grenvendejo, franjo Liu Jongjun. Ŝi konstante helpis min

pro mia maljuneco kaj sendis al mi rizon kaj farunon ĉiam en la ĝusta tempo. Ĉifoje, informiĝinte, ke vi revenos, ŝi speciale demandis, kion mi bezonas. Mi diris, ke vi ŝatas manĝi fiŝon. Jen ŝi alportas farunon kaj fiŝon. Mi ne atendis, ke vi ambaŭ renkontiĝis survoje.”

Tion aŭdinte, Honghin forte kortuŝiĝis kaj diris emocie: “Dankon, franjo Liu! Mi nepre lernos de vi la bonan penson kaj bonan laborstilon por servi al la popolo.”





Franjo Liu diris: “Mi faris ankoraŭ nemulte. Mi devas bone lerni de ĈPLA.”

Tiam, onklino Vang portis al franjo Liu bovlon da zingibra dekoktaĵo kun sukero kaj diris: “Trinku, ĝi varmigis vin!” Sed, franjo Liu foje kaj refoje rifuzis. Onklino Vang diris kun afektita malkontento: “Ĉu vi povas trompi min!” Tiam ŝi elprenis kukon el poŝo de franjo Liu kaj diris: “Rigardu, denove vi manĝos malvarman kukon pro okupateco.”

Konsciinte, ke la bonvolo de maljunulino estas nerifuzebla,

franjo Liu akceptis la varman dekoktaĵon kaj diris: “Onklino, ĉifoje vi tamen ne divenis. Hodiaŭ mia knabo petole difektis la internon de la forno, tial ni ne povas prepari manĝaĵon.”

Ŝia vorto vekis atenton ĉe Honghin. Li pensis: Franjo Liu estas tiel okupata, ke ŝi eĉ ne havas tempon por ripari fornon. Mi devas ĝin ripari por ŝi.

Li demandis pri la adreso de franjo Liu. Kaj post kiam franjo Liu foriris, li diris al sia patrino: “Panjo, mi iras ripari fornon por franjo Liu.”

“Bone, iru!” Onklino Vang diris ĝoje.

Dum tagmeza laborpaŭzo, Liu Jonggjun rapidis hejmen por ripari la fornon. Enirinte sian domon ŝi trovis, ke fajro vigle brulas en la forno kaj ŝia infano atente aŭskultas revolucion rakkonton sidante vizaĝ-al-vizaĝe kontraŭ iu ĈPLA-ano. Ŝi atente rigardis la ĈPLA-anon, kaj konstatis, ke li estas neniu alia ol kamarado Vang Honghin kiu ĵus hejmenrevenis. Ŝi tuj komprenis ĉion kaj rapide paŝis al li dirante kun dankemo: “Nivere estas samfamilianoj.”



### NOVA KREADO EN FUĜOŬA SKULPTA ARTO

La Fuĝoŭa Fabriko de Skulptaĵoj produktas diversajn metiartaĵojn el ŝtono, ligno kaj eburo. La ŝtonskulpta arto de Fuĝoŭ komenciĝis en Ming-dinastio antaŭ pli ol 300 jaroj kaj oni uzas loke produktitan buntan ŝouŝan-an ŝtonon kiel materialon. Ĝia lignoskulpta arto komenciĝis antaŭ pli ol 190 jaroj en King-dinastio kaj oni uzas longanan lignon kiel materialon. Ĝia eburoskulpta arto elvolviĝis surbaze de ĝia delikata lignoskulpta arto.

La Granda Proletara Kultura Revolucio malfermis vastan perspektivon por la disvolviĝo de la skulpta arto. La partia organizo kaj revolucia komitato de la Fuĝoŭa Fabriko de Skulptaĵoj organizis la laboristojn por serioze studi brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ kia estas *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, dank' al kio altiĝis ilia konscio

en efektivigo de la revolucia linio de literaturo kaj arto de Prezidanto Maŭ. Ili vidis, ke la tradiciaj artoj estas kristalo de la saĝo de la antikva laboranta popolo kaj valorega heredaĵo de nia lando, kiun ni devas kritike heredi kaj disvolvi kaj el kiu alpreni la elitaĵon kaj forĵeti la feĉon, por ke ili pli bone servu al la socialisma revolucia afero. Ili persistas en regula produktado de la tradiciaj metiartaĵoj kun sana enhavo kaj alta artnivelo, kiaj estas energioplene galopantaj ĉevaloj, versimilaj ursoj kaj elefantoj, delikate gravuritaj korboj kun krizantemoj kaj floraj pelvoj kun fruktoj. Ili ankaŭ kreis novajn artaĵojn respegulantajn la aktualan vivon kaj batalon, kiel ekzemple *Lago Plena de Anasoj*, *Riĉa Rikolto* kaj *Revenanta kun Plena Ŝarĝo*, kiuj respegulas riĉan rikolton de la popolaj komunumoj en nia kamparo kaj *Ŝtormo en Azio*, *Afriko kaj Latinameriko* k.a. kiuj respegulas la bravan batalon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Tiuj novaj verkoj ne nur daŭrigas la tradician stilon de skulpta arto, sed ankaŭ plenas je batala spiro de tiu ĉi epoko kaj ili estas laŭdataj de la vastaj amasoj. En 1971, la novaj kreaĵoj plimultiĝis je pli ol 50 procentoj kompare kun tiuj en 1970.



## **PATRIOTAJ ARMEANOJ KAJ POPOLANOJ DE LAOSO EKSTERMIS PLI OL 1,100 MALAMIKOJN EN FEBRUARO**

En februaro, patriotaj armeanoj kaj popoloj de Laoso vaste faris atakojn sur ĉiuj batalejoj de la tuta lando kaj ekstermis grandan kvanton da aktivaj fortoj de la malamiko.

Ili faris sinsekvajn atakojn al la malamiko kaj frakasis ĝiajn "demordetajn" operaciojn sur diversaj batalejoj en la lando, precipe en Muong Kassy, Phu Moc kaj la areo sude de la ebenejo Jars en supra Laoso, kaj ankaŭ en la Ban Nhik-Pakse-parto de la ŝoseo N-ro 23, en la norda parto de la ŝoseo N-ro 9 kaj Dong Hen. En februaro, ili ekstermis pli ol 1,100 malamikojn, faligis 3 usonajn aviadilojn, kaptis kaj detruis 10 militajn veturilojn kaj grandan kvanton da militaj materialoj kaj liberigis pli ol 13,200 popolojn.

*Kurierinoj de la Popolaj Naciliberegaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo*



## **PATRIOTAJ ARMEANOJ KAJ POPOLANOJ DE KAMBOĜO EKSTERMIS 700 MALAMIKOJN**

Post multtaga sieĝado al la malamikaj trupoj en Kompong Thom, la Popolaj Naciliberegaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo faris samtempajn atakojn je la 21-a de februaro al Roca Camray, Pramday, Dong Pucyuc, Pannachi kaj multaj aliaj defendaj pozicioj de la malamiko sude de Kompong Thom. Je konkero kaj detruo de la malamikaj gravaj pozicioj ĉe Roca Camray k.a., ili ekstermis pli ol 700 malamikojn kaj kaptis grandan kvanton da armiloj kaj militaj materialoj.

## **ARMEANOJ KAJ POPOLANOJ DE NORDA VJETNAMIO FALIGIS TRI USONAJN AVIADILOJN**

La 5-an de marto, senpilota aviadilo ekspedita de la usona imperiismo invadis la aeran teritorion de norda Vjetnamio kaj estis faligita de armeanoj kaj popoloj de la provinco Quang Binh.

La 6-an de marto, en la provinco Nghe An oni faligis 2 usonajn jetojn.

*Virinoj de norda Vjetnamio en batalo kontraŭ usonaj rabistaj aeroplanoj*







### LA BRAVE BATALANTAJ VIRINOJ DE VJETNAMIO


Alte tenante la standardon de firma decido batali kaj venki kaj disvolvante la bravan kaj obstinan batalspiriton, la heroaj virinoj de suda kaj norda Vjetnamio ricevis elstarajn sukcesojn tiel en produktado kiel en batalo kontraŭ la usonaj agresantoj.

Virinoj de suda Vjetnamio aktive aliĝis al gerilaj taĉmentoj, disvolvis geriladon, vigle subtenas la fronton kaj faris kontribuon por frakasi la "pacigan" intrigon de la malamiko. Fratino Lap, kano-nistino brave batalanta sur la fronto de Dau Tieng de la provinco Thu Dau Mot, faligis unu malamikan aviadilon kaj mortigis multajn malamikojn, kiam la lastaj atakis sub ŝirmo de aviadiloj. En la okcidenta regiono de la suda parto, la vastaj amasoj de virinoj disvolvis pinto-kontraŭ-pintan batalon

kontraŭ la malamikoj, tiel ke multaj junuloj evitis perfortan rekrutadon kaj multaj fiuloj estis punitaj kaj arestitaj de ili. Kune kun aliaj popoloj ili faris politikan ofensivon kontraŭ la malamikoj kaj kapitulacigis multajn soldatojn de la pupa armeo al la popolo.

La virinoj de norda Vjetnamio atingis grandajn sukcesojn kaj en batalo kaj en produktado. Sub la senĉesa bombado kaj atakado de aviadiloj de la usona imperiismo, la vastaj amasoj de virinoj aktive partoprenis en milicaj memdefendaj taĉmentoj kun profunda malamo al la malamiko kaj disvolvante la revolucionan tradicion de nefleksebla batalspirito. El la membroj de la taĉmentoj de norda Vjetnamio, 35 procentoj estas virinoj. Ili faris siajn kontribuojn sur la frontoj de agrikulturo, industrio kaj komunikado por subteni la nacisavan militon kontraŭ la usona agreso.

*Batalantoj de la laosaj lokaj armitaj fortoj de la provinco Khammouane defendas sian hejmlokon.*




# Belarta Ekspozicio de Vjetnamio kontraŭ Usona Agreso por Nacisavo

**N**I ĝoje vizitis Belartan Ekspozicion de Vjetnamio kontraŭ Usona Agreso por Nacisavo, kiu elmontris 229 verkojn de vjetnamaj pentristoj kreitajn en 1961 — 1971. Multaj el ili prezentas Prezidanton Ho Chi Minh inter laboristoj, kamparanoj kaj batalantoj, kiel ekzemple *Onklo Ho Ankorau Marŝas Kune kun Ni* farita de Huy Oanh

kaj Nguyen Thu. Tiuj artaĵoj vivece esprimis senliman amon de la vjetnama popolo al Prezidanto Ho kaj estas varme akceptataj de ĉinaj popolamasoj.

Ĉinio kaj Vjetnamio estas tre intimaj najbaroj interligitaj per montoj kaj riveroj. La popoloj de la du landoj batalas kune, subtenas unu al la alia kaj fondis profundan amikecon en longtempa

“Fera kaj Ŝtala Fabriko de Thai Nguyen”





revolucia batalado. La silkpenetraĵo de Ho Quang kun la titolo *Inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja Profundas la Amikeco: Samideaneco plus Frateco* citita el brilaj versoj de Prezidanto Ho Chi Minh reaperigis la scenon kiam la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho intime manpremas kun la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, esprimante la komunan deziron kaj batalan unuiĝon de la du popoloj. Ĝi ricevis varmajn laŭdojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia lando.

La ekspozitaĵoj karakteriziĝas per enhavo plena de batalo kontraŭ imperiismo, varieca formo kaj originala nacia stilo.

Ili koncentrite eldiris la firman volon de la vjetnama popolo por liberigi la Sudon, defendi la Nordon kaj unuigi la patrolandon en efektivigo de la solena alvoko de Prezidanto Ho **“Tiel longe ĝis kiam unu sola agresanto restos sur nia tero, ni batalos plu por lin forpeli”**.

Enirinte la ekspozitan halon, la vizitantoj estas tuj altirataj de pentraĵoj kun la heroaj figuroj de

vjetnama popolo kuraĝe batalanta sur la plejfronto kontraŭ usona agreso kaj laboranta peneme sin apogante sur propraj fortoj. Jen bravaj milicianinoj forte punas usonajn aerajn rabistojn per maŝinpafilo, jen tre singardemaj batalantoj de la popola armeo observas movojn de la malamikoj, jen indignaj armeanoj kaj popolanoj kune kanonas la agresantojn, jen veterana milicano lerte pafas la malamikan aeroplanon per fusilo, jen avino brave transportas per boato batalantojn trans riveron kaj jen aro post aro da junuloj marŝas al fronto kun forta malamo al la malamikoj...

La pentraĵo *Firme Defendi la Transportan Linion de Truong Sinh*, la desegnaĵo *Longdai-flosponto en Guang Binh* de Hoang Van Thuan kaj la lignogravuraĵo *Sur la Ponto* de Dang Tin Tuong, ĉiuj pri-kantas la heroan popolon en defendo de transporta sistemo de Vjetnamio. Ponto estis difektita de bombado, oni anstataŭigas ĝin per flosponto; sen bareloj, oni uzas interligitajn lignojn por konstrui flosponton; domoj estis detruitaj, oni fosas kavernojn por enloĝi. Ĉiuj krimoj de la usonaj agre-

### “Printempa Semado”



“Unuiĝo de la  
Popoloj de la Tri  
Landoj en Hinda-  
ĉinio”



# KHOI ĐOÀN KẾT

## NHAN DÂN BA NƯỚC ĐÔNG DƯƠNG

santoj neniel povas ŝanceli la ŝtalan decidon de la vjetnama popolo en la batalo kontraŭ la usona agreso.

La vjetnama popolo kaj la popoloj de Laoso kaj Kamboĝo strikte kunagis kaj kune batalis kontraŭ la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj. Tiun temon priskribis vivece la pentristo Quang Tho per sia verko *Unuiĝo de la Popoloj de la Tri Landoj en Hindaĉinio*. Sub la gvido de la Vjetnama Partio de Laboro kaj alte tenante la standardon “**firma decido batali kaj venki**”, la heroo vjetnama popolo sinforĝese laboras kun obstina kaj penema revolucia spirito por subteni la fronton kaj konduki la kontraŭusonon nacisavan militon ĝis la fino. La granda

lakgravura pentraĵo *Fera kaj Ŝtala Fabriko de Thai Nguyen* farita de Boi Trang Truoc skizis impeton de la vjetnama industrio. La pentraĵoj *Akvoutiliga Konstruado* de Lai Dang Bach, *Riĉrikolto* de Thang Giai kaj *Printempa Semado* de Van Can ĉiuj sukcese bildigis la kortuŝajn scenojn, en kiuj la vjetnamaj kamparanoj kaj batalas kaj produktas.

La vjetnamaj popolanoj kaj artistoj en la Nordo ĉiam sopiras siajn samlandanojn en la Sudo. Nemalmultaj ekspozitaĵoj spegulis la batalan vivon de la sudvjetnama popolo. En tradicia artformo populara en Vjetnamio, la lakpentraĵo *Brusto kontraŭ Pafilo* de Hoang Van Cam varme prikantis la sinoferemon kaj sentimecon de la sudvjetnama



popolo kontraŭ perforto. Krome, vjetnamaj artistoj ankoraŭ kreis multajn pentraĵojn kiuj prezentas sudvjetnamajn virinojn en batalo.

La ekspozicioj manifestis grandan sukceson de vjetnamaj belartistoj en profundiĝo en la popolon, partopreno de praktika batalo kaj klopodo pri arta kreado. Ĉinaj belartaj laborantoj devas lerni de ili la revolucionan spiriton unuiĝi kun la popolo, kuraĝigi kaj eduki ĝin per peniko kiel armilo por bati la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn.

Prezidanto Maŭ montris: **“La sepcentmiliona ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo.”** Sekvante tiun instruon ni certe unuiĝos por ĉiam kun la vjetnama

popolo kaj la popoloj de Hindoĉinio, batalos kaj venkos kune kun ili. Inter Ĉinio kaj Vjetnamio estas intima rilato kaj vasta interfluo de literaturo kaj arto. Ni dankas al la Vjetnama Belartista Asocio, kiu alportis al ni elstarajn pentraĵojn kaj ankaŭ profundan amikecon de la vjetnama popolo al nia popolo. Ni ĝojas pro la brilaj atingoj akiritaj de la vjetnamaj artistoj kaj varme gratulas al la vjetnama popolo pro iliaj venkoj en batalo. Ni kredas, ke post kiam tiu ekspozicio prezentigis sinsekve en diversaj lokoj de nia lando, floros ankoraŭ pli brile la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio.

Certe venkos Vjetnamio! Certe fiaskos la usona imperiismo!

*La heroo vjetnama popolo firme kondukos la kontraŭusonon nacisavan militon ĝis la fino! (afiŝo)*



## Korespondi Deziras

\*Dunĝeanu Nataŝa, P.O.Box 41, Suĉeava 1, Rumanio, 36-j. inĝenierino en agrikulturo, kun samfakuloj el Afriko, Azio, precipe Ĉinio.

\*Ernesto Ŝlezinger, Str. Dr P. Groza No. 22, Cluj, Rumanio, kun Ĉinio, Koreio, Vjetnamio k aliaj aziaj k afrikaj landoj. Preferitaj seriozaj filatelistoj k bk-kolektantoj.

\*Ivan Rejent, Leninstrato 140, Lanškroun, okr. Usti n/Orl., Ĉeĥoslovakio, 20-j. studento, dez. kor. k interŝ. pk, bk, diversajojn.

\*Pletersky Anton-Tone, Moskri-ceva 46, Ljubljana, Jugoslavio, kun geamikoj en Aŭstralio, Koreio.

\*Francisc Pall, Alba Iulia, str. Bibliotecii nr. 3, Jud. Alba, Rumanio, 22-j. studento, kun geamikoj tm.

\*Ludoviko Mester, Barand, Hajdu-Bihar m., Arany Janos-u. 29, Hungario, 49-j. instruisto, kun ĉina esperantisto, pri literaturo k poezio.

# Pri la Revolucia Moderna Pekinopero

## “Spirito de Longgiang”

La afero okazis en printempo de 1963.

Eksterordinara sekegeco atakis iun lokon de sudorienta apudmara regiono de nia lando kaj la partia komitato de tiea gubernio faris decidon: Konstrui barajon en la rivero Giulonggiang ekster la digo de Longgiang-brigado por konduki la riverakvon en altan lokon suferantan sekegecon. Giang Ŝujjing, sekretario de la partia filio de la brigado, firme plenumis la decidon de la gubernia partia komitato kaj gvidis la vastajn amasojn de komunumanoj en barado de la rivero.

En la barado Longgiang-brigado devos ricevi grandan damaĝon: La rivero devios kaj la 20 hektaroj da produktemaj kampoj ekster la digo estos inunditaj; kiam la rivero fluos tra iu monto, oni devos plene malfermi la kluzpordon por altigi akvon, tial la aliaj 200 hektaroj da kampoj de la brigado estos minacataj de inundo.

Antaŭ la rigora provo brigadestro Li Ĝitian kaj aliaj montris sian grupan egoismon. Ili zorgis nur pri tio, ke baro de la rivero alportos al sia brigado damaĝon, sed ne konsideris, ke pli multaj

kampoj de aliaj brigadoj soifas, tial en la batalo kontraŭ sekegeco li agis heziteme kaj ŝanceliĝe. Profitante la ŝancon, kontraŭrevoluciulo Huang Guoĝong, kiu kaŝiĝis en la brigado alinomiginte, faris subfoson.

Laŭ instruo de Prezidanto Maŭ, Giang Ŝujjing firme unuiĝis kun la kadroj kaj komunumanoj, pacience helpis Li Ĝitian venki la eraran penson kaj frakasis la intrigon de la malamiko. Ili disvolvis komunisman spiriton oferi sin pro alies interesoj, cedis akvon kaj donis grandan helpon al aliaj brigadoj en venko super la sekegeco.

Ankaŭ la aliaj brigadoj donacis al Longgiang-brigado sterkaĵojn kaj rizidojn kaj sendis homojn por helpi ĝin, tiel ke la inunditaj kampoj de Longgiang-brigado baldaŭ estis riparitaj kaj la damaĝo estis kovrita.

En sekegeca jaro tiuj ĉi brigadoj akiris ĝojindan riĉan rikolton, kio manifestis la senkomparan superecon de la popola komunumo. Tamtamante kaj tamburante, la brigadoj venis unu post alia por vendi al la ŝtato superfluan grenon.

*Kamaradino Giang Ŝujjing transkomunikas la instrukcion de la gubernia partia komitato, por ke ĉiuj mobiliziĝu al batalo kontraŭ trosekeco.*





延安頌  
庚子深  
秋曾禱  
延安仰  
瞻革命  
紀念文  
物不禁  
肅然起  
敬低細  
久之歸  
而寫法  
以詩詞  
錢松年  
作後

Jan-an

